

N-ro 148-149 Vintro 2008

ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN 1565-3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo

האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו בישראל



La 9-a KIES en Bet-Ĝan – grupa foto dum la ekskurso al sinagogo Bar'am

Promesoplena komenco en Amano - *Renato Corsetti*

Historio de la revuo (1959-2009) - *Josef Ŝemer*

Nia vojaĝo en Israelo - *Boris Kolker*

Redaktoro

Amri Wandel

Vicedaktoro

Sergej Tyrin

Prezidanto

Josef Ŝemer

Redakcia adresoP.O.K. 15092, IL-84120 Beer-Sheva
ie@esperanto.org.ilAdministra adresoP.O.K. 22041, IL-61220 Tel-Aviv
eli@esperanto.org.il

Abontarifo por eksterlandanoj: 10 EUR.
Eblas transpagi al UEA-konto *elia-q*
aŭ mendi ĉe la Libroservo de UEA.

Anonctarifoj por duona paĝo:
nigra-blanka 35 EUR, plenkolora 50 EUR.

Fondita en 1959 kiel 'Nia Ligilo'.

Enhavo

- 3 Jubileo de la revuo (1959-2009) *Josef Ŝemer*
7 Eksterlandaj legantoj gratulas
9 Promesoplena komenco en Amano *Renato Corsetti*
10 ELI fariĝis membro de KAEM *Amri Wandel, Esti Saban*
12 Esperanta travivaĝo en Japanio *Hagar Lidor*
19 La japana kontakto *Ajala Danon*
20 Nepal-stila geedziĝo *Razen Manandhar*
22 Travivaĝoj en Nepalo *Amri Wandel*
27 “La Hebrea” *Jona Volaĥ / Doron Modan*
29 Pri Claude Piron *Doron Modan*
30 “Viro revenis hejmen de la laboro” *Josef Ŝemer*
31 Memorinda momento de UK *Enrica Arbib*
32 Agado de ELI dum 2008 *Josef Ŝemer, Amri Wandel*
34 La 9-a KIES en Bet-Ĝan *Amri Wandel*
36 Nia vojaĝo en Israelo *Boris Kolker*
38 RUBRIKO Persona renkontiĝo *Gila Wandel*
40 “Tri” *Natan Zaĥ / Ŝaul Ŝemer*
41 Nekrologoj – J. Gishron, M. Braĥa *Josef Ŝemer*
44 La peranto *Amri Wandel*

Karaj Legantoj,

En februaro 1959 aperis la unua modesta kajero de *Nia Ligilo*, kiu poste fariĝis “Israela Esperantisto”. De tiam la revuo aperis regule, 2-4-foje jare, ĝis 2008, kiam Doron Modan, kiu redaktis ĝin brile dum sep jaroj, decidis forlasi la redaktoran fotelon. Liaj anstataŭantoj, pro personaj kialoj, ne sukcesis kompletigi la revuon laŭlonge de la jaro, kaj tiam la Estraro de ELI nomumis min kiel redaktoron de tiu ĉi duobla jubilea numero. Kompense al sia tutjara foresto, nia revuo ĉi-foje havas 44 paĝojn kaj ĉ. 30 fotojn. Okaze de la jubileo vi trovos ampleksan artikolon el la plumo de Josef Ŝemer, pri la 50-jara historio de IE. Ĉi-jare ELI havis almenaŭ du rimarkindajn sukcesojn, kiuj reflektiĝas en la revuo: ni oficiale aliĝis al la Azia Movado (KAEM), kaj sekve de tio, la numero prenos vin al ravaj vojaĝoj tra Japanio kaj Nepalo. Antaŭ du monatoj ELI unuafoje organizis tritagan Esperanto-semajnfinojn, kiu videblas sur la dorsa kovrilo kaj en bunta, ampleksa raporto. Vi renkontos novan rubrikon: “Persona Renkontiĝo” – niaj membroj prezentas sian specialan mondon: profesie, ŝatokupe aŭ alimaniere. Ĉi-foje ni konatiĝos kun la profesia mondo de Gila Wandel – la etiopiaj enmigrintoj en Israelo.

Februare IE festos la kalendaran jubileon, sed ni povos denove jubilei en la venonta numero, kiu estos la 150-a. En ĝi vi povos i.a. legi la rememorojn de Josef Ŝemer pri la historio de ELI, malkovri raran libro-trezoron de la unuaj jardekoj de Esperanto, plu vojaĝi tra Nepalo kaj Japanio, kaj “Persone Renkontiĝi” kun tre speciala membrino.

Fine mi ŝatus danki al ĉiuj kontribuantoj (ili kaj aliaj estas kompreneble bonvenaj ankaŭ al la estontaj numeroj) kaj aparte al miaj kunteamanoj – Josef Ŝemer, kiu provlegis, kaj Sergeo Tyrin, kiu enpaĝigis.

Amri

Jubileo de la revuo ISRAELA ESPERANTISTO (1959–2009)

Josef Ŝemer

EN FEBRUARO 1959 komencis aperi la stencilita bulteno de la israelaj esperantistoj *Nia Ligilo*. Mi tenas ĝin nun enmane kaj legas ĉekape de la paĝo: “Nia Ligilo – *Bulteno de Esperantista Ligo Israellanda*” (vidu la foton sekvapaĝe). En la dua numero (decembro 1959) ŝanĝiĝis la subtitolo al: “*Interna bulteno de Esperantista Ligo en Israelo*”. Sed en la 9-a numero jam aperas alia titolo: “*Organo de Esperantista Ligo Israela*”.

Vi ridetas, ĉu ne? Sed mi ankoraŭ ne finis: kio aperas ĉe la 10-a numero (junio 1962)? Mi citas: “*Organo de Esperantista Ligo en Israelo*”.

Ĉu per tio finiĝis nia eta sagao? Ne, ĉar iom poste nia asocio ŝanĝis sian oficialan nomon, kaj jen en oktobro 1963 ni legas sur la titolpaĝo de la 14-a numero: “*Organo de Esperanto-Ligo en Israelo.*” Kaj tiel restis ĝis hodiaŭ... Verdire ni devas laŭdi kaj omaĝi al la tiamaj ĉef-agantoj de la movado, kiuj decidis aperigi gazeton post multaj jaroj da interrompo (kiel mi klarigos poste). Dum la jubilea jaro 1959 – 100-jara datreveno de naskiĝo de Zamenhof – revigliĝis la agado de la israelaj esperantistoj (legu pri tio en la venontnumera artikolo “*Rememoroj de E-veterano*”) kaj la decido reeldoni la bultenon de la Ligo estis parto de tio. Mankas la nomoj de la redaktoroj de la unuaj numeroj, sed almenaŭ ĉe la 9-a numero (marto 1962) aperas la jena frazo: “Ĉi-numeron redaktis kolegio en la jena konsisto: Mag. Anna Dratver, d-ro Jakov Beĥar, Kamil Perlman kaj Jozef Murĵan”. *Rimarko*: la lingvaj eraroj (ekz.: *kolegio* anstataŭ *kolegaro*...) aperas nekorektitaj. Bedaŭrinde mankas la jenaj numeroj: 3-8, 12-13, 16-21; se iu el la legantoj posedas ilin, bv. sciigi.

La unuaj numeroj estas tre modestaj aspekte: stencilaĵoj kun malbelaj skribmaŝinaj literoj, fakte nur kelkaj paĝoj kunligitaj per agrafeto. Broŝurforma gazeto komencis aperi nur en 1969. En la unua numero, ĉe la rubriko “Karaj legantoj”, skribas la anonima(j) redaktanto(j): “Kun ĝojo ni transdonas en viajn manojn tiun ĉi modestan numeron de la bulteno, kiu aperas post kelkjara interrompo.” Mi ne posedas pli fruajn bultennumerojn eldonitajn en Israellando, sed ni scias ke en 1924 aperis en Tel-Avivo verŝajne la unua E-periodaĵo. Ĝi estis nomata *Hebrea Esperantisto*. En 1941 fondiĝis en Ĥajfo la unua oficiala tutlanda asocio, kiu portis la nomon *Palestina Esperanto-Ligo* (PEL). Ekaperis tiam ĝia stencilita periodaĵo *Interna Bulteno*, redaktita de Jeĥezkel Armoni. Ĝi aperis regule ĝis 1946.

Do, antaŭ 50 jaroj fondiĝis *Nia Ligilo*. En novembro 1973 la nomo ŝanĝiĝis al *Israela Esperantisto*. La ideon levis dum la Landa Kunveno de ELI unu el niaj veteranoj, d-ro J. Beĥar. “Ni devas substreki antaŭ la tuta Esperanta mondo, ke la revuo estas de Israelo,” li diris dum fervora prelego, kiun mi bone memoras, kaj deklaris ke li donacos ne malgrandan monsumon se oni akceptos lian proponon. Kaj tiel okazis!

Dum la jaroj redaktis la revuon multaj homoj, ĉu kiel parto de komisiono ĉu sole. Krom la supre menciitaj, ili estis: Jehiel Ben-Alter, Aŝer Ron, Dora Wunderbaum, Reuven (Robert) Alberg, Aleksander Manor, Anat Zdunski-

Zajdman, Josef Ŝemer, Doron Modan kaj Sergej Tyırın (kelkaj nur helpis al la ĉefredaktoro). Sed ni ne devas forgesi, ke en la antaŭkomputila epoko oni bezonis ankaŭ tajpiston, nome tiun volontulon, kiu sidis dum multaj horoj ĉe sia skribmaŝino kaj tajpis la tutan gazeton. La preserarojn li korektis poste



uzante la forviŝan blankan likvaĵon nomatan “Tipex”. Dum multaj jaroj faris ĝin d-ro Maŝler. Dum pli ol 10 jaroj mi helpis al li: ni sidis sur lia balkono ĉe str. Harpards en Tel-Avivo, mi laŭlegis la tekstojn kaj li tajpis. Poste mi provlegis la tuton kaj li tajpkorektis la erarojn. Pena laboro ĝi estis. Dum la jaroj 1989-1994 faris ĝin Cvi Ŝolt, sed bonŝance li jam havis komputilon – granda progreso

teknologia, kiu multe plibonigis la eksteran aspekton de la revuo. Anstataŭis lin en la jaroj 1994-2001 Aleks Kerbel.

Dum multaj jaroj aperis, aldone al E-rilataj artikoloj, ankaŭ verkoj pri la israela-araba konflikto, ĉar diversaj verkistoj sentis la bezonon informi al la eksterlandaj legantoj pri la ŝtatpolitiko de Israelo. Plie aperis multaj artikoloj pri diversaj aspektoj de nia lando: vidindaĵoj, atingiĵoj, kulturo, statistikaĵoj ktp. Tiu ĉi tendenco ĉesis dum la 80-aj jaroj. Ekde tiam la enhavo estas tre varia, miaopinie pli universala kaj ankaŭ pli Esperanta. Tamen daŭre aperis de tempo al tempo artikoloj pri nia lando kaj kulturo.

Mi redaktis la revuon dum multaj jaroj: en la komenco kune kun la “tre pasiva” ĉefredaktoro Aleksander Manor (1975-1981) kaj poste (1981-2001) sole. Sed verŝajne la plej bona redaktoro ĝis nun estis Doron Modan, kiu faris tiun ĉi laboron dum la jaroj 2002-2007 kvazaŭ li estus profesiulo. Interalie li iniciatis enigon de koloroj, kovrilpaĝe kaj ĉe la internaj fotoj. Dum lia redakta epoko nia revuo fariĝis tre altnivela kaj estis laŭdata de

pluraj eksterlandaj eminentuloj.

Jen kelkaj interesaj fragmentoj de artikoloj aŭ informoj, publikigitaj antaŭ multaj jaroj en *Nia Ligilo* kaj *Israela Esperantisto*:

1. Anonco: “La samideano, kiu erare metis esp. libron pri Japanujo en sian aktujon – bonvolu senprokraste resendi ĝin al L. Ringler, Kfar Ata, Blokonim 95.” (j. 1962)

2. Informo: “Laŭ la propono de ELI la urbestro de Bat-Jam, dum sia kunsido de la 6.8.1962 decidis nomi unu straton per nomo de d-ro Zamenhof.”

3. Informo: “Direktoro de la mezlernejo Dov-Hoz en Jafo, s-ro Buĥner, iniciatis kurson de Esperanto inter la lernantoj. Estis delegita d-ro Maŝler por organizi kaj gvidi la kurson. Registris sin jam tiel granda nombro de gelernantoj, ke oni ne povis ĉiujn akcepti.” (j. 1959)

4. Nekrologo: “Kun granda malĝojo ELI sciigas pri la tro frua morto de vicurbestro s-ro J. Burŝtyn, kiu estis ankaŭ estro de la kultura agado de telaviva urbestro, kaj estis granda kaj sincera amiko de nia movado. Li multe helpis nian agadon...” (j. 1968)

5. Informo: “Je la 17-a de julio 1968 kunvenis kelkdeko da telavivaj gejunuloj por komenci agadon en kadro de junulara, esperantista rondo en Tel-Aviv. Estas elektita provizora estraro el jenaj personoj: Barbara Balkan, Josef Ŝmerlis, Ŝabtaj Matalon, Alon Bor. La estraro havas la taskon prilabori konkretan planon por efektiviĝi sian riĉan programon de agado...”

6. El artikolo de d-ro Maŝler nomata “Novaj junaj fortoj en Israelo” (1976): “En la lastaj jaroj la afero ŝanĝiĝis. Tute subite la juna generacio vekigis... J. Ŝemer prenis al si ankaŭ grandan kaj malfacilan laboron de la administracio de ELI, JELI kaj de *Israela Esperantisto*... J. Tilleman scipovis aktivigi la Nordan Grupon de Israelo... A. Wandel scipovis per sia obstineco paroligi esperante sian tutan familion. Li scipovis instigi la gejunulojn partopreni junularajn kunvenojn, kiuj apartiĝis de la klubejaj vesperoj.”



7. La unua kontribuo de Amri Wandel, la redaktoro de la nuna n-ro, aperis en IE n-ro 52 (oktobro 1974): “Raporto pri la 30-a IJK, Munster”. Interalie li skribas pri tiu ĉi – por li unua – Internacia Junulara Kongreso: “Partoprenis ĝin 250 junuloj el 32 landoj, inter ili estis ankaŭ unu el Irako. Israela delegacio ne havis kun li kontakton.” *Rimarko*: Amri mem skribis “la israela delegacio”, sed ĉar la redaktoro kaj la korektanto estis ambaŭ pollingvuloj, ili apenaŭ uzis la artikolon “la”. Vi povas rimarki tion en preskaŭ ĉiuj supraj citaĵoj (simile al la nuntempaj ruslingvaj novenmigrintoj, kiuj parolas hebree sen la artikolo...).

Dum la lastaj jaroj estis eldonataj du numeroj jare. Pli frue ni eldonadis po 3 numerojn kaj dum multaj jaroj aperadis 4 numeroj jare. La nuna eldonkvanto estas 280 ekzempleroj. La revuo estas dissendata al ĉiuj membroj de ELI, al kelkdeko da eksterlandaj pagintaj abonantoj kaj al kelkdeko da Landaj Asocioj de UEA kaj gazetredaktoroj. Du ekzemplerojn de ĉiu numero ricevas la Nacia Biblioteko en Jerusalemo, kiu gardas ilin, same kiel ĝi faras pri ĉiuj periodaĵoj eldonataj en Israelo.

Estu mia artikolo omaĝo al la ne malmultaj israelaj gesamideanoj, kiuj ebligis la aperon de la 149 numeroj de *Nia Ligilo* kaj *Israela Esperantisto* dum 50 jaroj (venontjare ni povos festi plian datrevenon: apero de IE numero 150!...) Mi deziras multe danki al Amri Wandel, kiu transprenis sur sin la redaktan laboron de tiu ĉi duobla jubilea numero. Mi esperas, ke la rezultoj de lia laboro estos bonaj kaj esperdonaj. Fine mi esprimas la deziron ke nia gazeto floru ankaŭ estontece; mi citu la bonvenigajn vortojn de la redaktanto(j) de *Nia Ligilo* n-ro 1: “Unu el la plej gravaj kondiĉoj, ke la bulteno aperu regule estas la monrimedoj. [...] Sed la plej grava kondiĉo estas la konkreta kunlaboro de pluraj samideanoj, kion ni esperas ĝui.”

Niaj eksterlandaj legantoj gratulas



Ans Bakker-ten Hagen (Nederlando)

Ne dum 50 jaroj mi legas vian revuon. Tamen de jardekoj mi ĝuas sekvi vian movadan agadon pere de “Israela Esperantisto”. Gratulojn al la jubileanto – ek al 120!

Via kamaradino Ans Bakker-ten Hagen



Renato Corsetti (Italio)

Gratulojn al *Israela Esperantisto*, kiu atingis la rimarkindan aĝon de 50 jaroj! Ni plustrebu kune al la paco!

Renato Corsetti



Boris Kolker (Usono)

Mia Ŝatata Gazeto

Meze de la 80-aj jaroj en la Urala urbo Ufa, en kiu mi tiam loĝis, mi neatendite ricevis koverton kun la rea adreso de Esperanto-Ligo de Israelo. Interne troviĝis numero de la gazeto *Israela Esperantisto*, kiun mi tuj avide tralegis. Post du monatoj venis nova numero. Poste okazis plur-monata paŭzo – verŝajne, la sovetia cenzuro konfiskis kelkajn numerojn (eĉ la vorto “Israelo” tiam estis tabua). Kaj kiam komenciĝis en Sovet-Unio la *perestrojko* (renovigo), tiu gazeto ĝojigis min per sia alveno ĉiun trian monaton.

Kiam nia familio transloĝiĝis en Usonon meze de la jaro 1993, mi petis, ke la gazeto estu sendata al mia nova adreso. Kaj fine mi ricevis eblon aboni tiun tre interesan gazeton: do mi pagis 25-jaran abonpagon kaj fariĝis dumviva abonanto de *Israela Esperantisto*. Kiam mi povis, mi klopodis liveri al IE ion specialan. Komence de la jaro 1997 en ĝi aperis mia artikolo “NIA Vilnĵuso kaj ILIA Jerusalemo” pri tio, kiel mi publikigis en la *Revuo Esperanto* recenzon pri israela libro, kaj kiel tio elvokis koleron en la Centra Komitato de Komunista Partio de Sovet-Unio kun iuj (ne tre gajaj) sekvoj por mi. La artikolo estis represita en la gazetoj *Eventoj*, *Litova Stelo*, *Esperanto sub la Suda Kruco* kaj *Sennacieca Revuo*; ĝi estas legebla rete.

Sekvajare mi publikigis en IE artikolon pri Interreto, kiu tiam estis malmulte konata inter esperantistoj. Kvankam poste mi dufoje reverkis ĝin, mi enmetis tiun tekston en mian libron “Vojaĝo en Esperanto-lando” kun indiko, ke ĝi estas represita el IE. Alian fojon Doron Modan intervjuis min por IE, kaj tiun intervjuon represis la *Revuo Esperanto* (ĝenerale, ĝi ne represas). Kiam mi trovis nekonatan leteron de Ludoviko Zamenhof, mi, kompreneble, donis ĝin por publikigo al mia ŝatata gazeto.

Israela Esperantisto kaj mi estas preskaŭ samaĝuloj: mi aperis en Esperantujo en la jaro 1957. Kion mi deziru al la jubileo de IE? Ke ĝi havu multe-multe da abonantoj, ankaŭ dumvivajn. Ke ĝi revenu al sia iama aperoritmio – kvarfoje en jaro. Miaflanke, mi klopodos ankaŭ estonte liveri al IE ion speciale interesan.

Boris Kolker

Vagado en la dezerto – promesoplena komenco en Amano

Renato Corsetti, Italio

NI ĈIUJ scias, ke judoj vagadis dum 40 jaroj en la dezerto antaŭ ol atingi la promesitan landon. Espereble la vojo komenciĝinta en Amano estos iom pli mallonga.

La dezerto en nia hodiaŭa situacio estas la malmulteco de arabaj esperantistoj. En la 1-a *Mezorianta Kunveno* en Amano partoprenis ĉiuj esperantistoj jordanaj, kiujn mi konas, kaj tamen ili estis nur tri. Partoprenis ankaŭ esperantista familio el Dubajo kaj triopo el Turkio. Aldonu tri eŭropanojn kaj la grandan israelan grupon (pli ol 10) kaj vi havas ĉiujn, kiuj aperas en la foto surkovrile.

Postkongreso en Ĝeraŝ



Tamen, iusence, la afero estis sukceso. Montriĝis, ke kun iom da prudento oni povas aranĝi renkontiĝon inter arabaj kaj israelaj esperantistoj, kaj ke en la esperantista medio (ne ekster ĝi) ĉiu akceptas ĉiun kaj pretas dialogi.

Aliflanke la vojo estas tre longa por alveni al la promesita situacio kun multaj esperantistoj en arabaj landoj. Nun bonŝance ekzistas kursoj retaj ankaŭ en la araba. La defio estas aktive informi pri ili en arablingvaj medioj retaj kaj paperaj (ĵurnaloj, revuoj, kaj similaj). Tion oni decidis fine de la prelegoj kaj debatoj. Ĉiu, kiu povas helpi pri tio, bonvolu ne heziti kontakti la Komisionon pri agado en landoj de Meza Oriento kaj Norda

Afriko, araba.komisiono@esperanto.org.

Oni decidis krome daŭrigi la tradicion de ĉi tiuj renkontiĝoj en landoj, en kiuj ĉiuj estas bonvenaj. Pri la venonta jaro oni esploras pri Egiptio kaj Turkio.* Tre interese Doron Modan montris, ke en la samaj tagoj en 1934 oni provis fari similan renkontiĝon. Do, ni reprenu tiun ideon, kaj ni provu produkti la arablingvajn esperantistojn, kun kiuj ni povos dialogi.

* Jam definitive estis elektita la urbeto İznik en Turkio por la renkontiĝo en 2009.

La 2-a Mezorianta Kunveno, aprilo 2009

POST la sukceso de la unua MK, okazinta lastan aprilon en Amano, Jordanio, ni – laŭ la plano – preparas por vi la duan Kunvenon, okazontan inter la 3-a kaj la 6-a de aprilo 2009, en İznik, Turkio. Ni esperas, ke partoprenos ĝin pli da samideanoj – el la Mezoriento kaj el aliaj mondpartoj – kiuj riĉigos nin per interesaj prelegoj, diskutoj kaj nekutimaj renkontiĝoj. Aldone estas planataj du ekskursoj (tuttaga kaj duontaga); interesatoj povos kune postkongresi en Kapadokio kaj en Istanbul. Detaloj troviĝas en la paĝaro <http://arabujo.afriko.org/mk/>

Tom Juval,
kunorganizanto de MK

Azia agado: ELI fariĝis membro de KAEM

KADRE de la fako “Landa kaj Regiona Agado”, Universala Esperanto-

Asocio dividas la mondon en plurajn regionojn, kaj  ekzistas pluraj komisionoj, kies tasko estas progresigi kaj raporti pri E-agado en malfortaj landaj asocioj kaj en landoj kie ne ekzistas Landaj Asocioj aŭ organizita movado. Tiel kadre de UEA ekzistas Afrika komisiono, Amerika komisiono, Eŭropa Klubo, la komisiono Araba Mondo kaj KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto–Movado). Dum multaj jaroj Israelo “falas inter la seĝoj”: en la landa agado de UEA ĝi apartenis nek al Azio, nek al Eŭropo, kaj kompreneble ne al la Araba Mondo.

Ankaŭ en la Estrara Raporto de UEA neniam estis mencio de agado en Israelo (escepte de 2005, kiam mi persone enmetis informon pri la historia aliĝo de la arabaj esperantistoj Fidaa kaj Wasseem). En la pasinteco mi plurfoje demandis en la Komitato kaj Estraro de UEA kial Israelo ne apartenas al la Azia agado, kaj la

respondo kiun mi ricevis (i.a. de la tiama prezidanto de KAEM) estis ke por UEA, Israelo ne troviĝas en Azio. Efektive, KAEM fondiĝis en la jaro 1990 por orienta Azio, kaj iom post iom aliĝis pli okcidentaj landoj – Barato, Pakistano kaj fine Irano, kiu dum multaj jaroj signis la okcidentan limon de Azio sur la mapo de UEA kaj KAEM.

En la jaro 2007 okazis du gravaj ŝanĝoj. Unuafoje israelano aliĝis al la Azia Kongreso, kaj UEA (sekve de



Esti Saban (blu-vestita) en la Azia Kongreso en Bengaluro

UN) ŝanĝis la nomon de la Araba Komisiono al “Komisiono por Meza-Oriento kaj Nord-Afriko” (kiun mi akronimas KOMONA) – la rilato al KAEM klariĝos sube.

Kiam mi ĉeestis la kunsidon de KAEM en la UK en Jokohamo, oni prezentis la Azian kongreson planitan por 2008 en Barato. Mi demandis ĉu ankaŭ israelanoj estas invitataj, kaj

la organizantoj respondis –“kompreneble”. Do mi tuj – surloke – aliĝis al la Azia kongreso en Bengaluro (fine mi ne sukcesis partopreni pro samtempe okazinta scienca konferenco en Kolkata, 500km pli norde, sed anstataŭis min Esti Saban). Reveninte de Jokohamo mi levis la temon en la Estraro de ELI, kiu decidis oficiale aliĝpeti al KAEM. Paralele, mi sugestis ke pro la ŝanĝo de nomo, nun Israelo povas ankaŭ kunlabori kadre de KOMONA (kio praktike jam okazis,

ĉar Tom Juval fariĝis organizanto de la unua *Mezorianta Kunveno* en Amano). Post iom da pritrakto UEA donis sian benon kaj KAEM unuafoje akceptis komisionanon de Israelo.

Kiel nia reprezentanto en KAEM la Estraro de ELI unuanime elektis

Esti Saban. Tio jam aperas en la Wikipedia retpaĝo de KAEM. Pri KOMONA estis interkonsentite ke Israelo estos kunlaboranto kaj Tom estos ĝia (intertempe neoficiala) reprezentanto.

Oni povas resumi ke en 2008 Israelo finfine ek-aperis sur la Esperanto-mapo de Azio kaj la Mezoriento.

Amri Wandel

Finfine, Israelo estas parto de Azio!

TIO OKAZIS en la 5-a Azia Kongreso en Bengaluro, Barato, kiam por la unua fojo oni deklaris ke Israelo estas parto de KAEM. Mi estis tiom fiera saluti ĉiujn je la nomo de Israelo! Jes, mi scias ke estas/os problemoj kaj malfacilaĵoj, sed almenaŭ ni povos influi – diskuti kaj interŝanĝi ideojn, kontraŭi aŭ akcepti diversajn proponojn, kaj informi pri la agado en nia lando kaj regiono. Multe da

laboro atendas nin kaj espereble iom post iom ni vidos ŝanĝojn.

El la agado lastjara: KAEM sendis Esperanto-librojn al nealiĝintaj land-organizoj (Kazakio kaj Srilanko). Por vigligi la movadon en tiuj landoj, ĝi komencis organizi la 6-an Azian Kongreson en Mongolio, kaj aperigis informon pri la 9-a KIES en sia bulteno. Esti Saban

[Ene de KAEM Esti respondecas pri la movado en la okcidenta regiono.]

De Modi'in al Oomoto per Esperanto

Antaŭ 28 jaroj mi unuafoje vizitis la centron de Oomoto en Kameoka, konatiĝis kaj amikiĝis kun Ago-san. Pasintjare Ago vizitis Israelon kiel oficiala delegito de Oomoto kaj gasto de ELI. Kiam li gastis en nia hejmo en Makabim, ni estis invitataj al vespermanĝo ĉe mia najbarino Ajala, organizantino de specialaj grup-ekskursoj al Japanio. Ajala kontaktis japanajn esperantistojn dum siaj antaŭaj vizitoj en Japanio, sed nun ŝi planis viziton de plena grupo da israelaj turistoj (ne-esperantistoj) ĉe Oomoto. Poste mi prenis Ago-n al rendezuo kun alia najbaro mia: la urbestro de Modi'in. La loka gazeto "Modi'in News" aperigis raporton pri la kurioza rendezuo inter la urbestro kaj la japana gasto, kiuj komunikis per Esperanto... Hagar, juna studentino, legis tiun artikolon, interesiĝis kaj eklemis Esperanton. Duonjaron poste ŝi decidis vojaĝi al Japanio, kaj kontaktis ELI por informiĝi pri kontaktoj kun japanaj esperantistoj. Ŝi skribis al Oomoto, kaj Ago invitis ŝin saluti, okaze de la oktobra festo de Oomoto kun ĉirkaŭ 200 Oomotanoj. Ajala kun sia grupo kaj Hagar vojaĝis al Japanio kaj vizitis Oomoton preskaŭ samtempe. Ili revenis enamiĝintaj en Japanion kaj Esperanton. Sekvas iliaj rakontoj.

Amri Wandel

Mia Esperanta travivaĵo en Japanio (parto I) Hagar Lidor

Elhebregis: Amri Wandel

ĈIO KOMENCIĜIS antaŭ kelkaj monatoj. Min kaptis la deziro vojaĝi, kaj ĝuste al Japanio. Mi provis pensi pri aliaj celoj, sed vane. Mi komprenis ke la vojaĝo al Japanio estas neevitebla. Ju pli mi legis pri Japanio, ties popolo kaj kulturo, des pli mi estis ravita kaj serĉis pli. La ideo vojaĝi al Japanio kaj

vidi kulturon tiom diferenca kaj ravan, plene ekkaptis min. Mi ekcerbumis kiel sperti tiun specialan kulturon plej aŭtentike kaj ĝuste. Mi komprenis ke dormante en hoteloj kaj pasante de unu turismaĵo al alia, mi riskas maltrafi mian deziratan travivaĵon.

Tiam mi ekmemoris pri Esperanto. Mi eklernis Esperanton ĉ. unu jaron pli frue; mi tre ĝuis la lernadon pere de la Interreto, kaj eĉ sukcesis daŭrigi iom da tempo, sed pro la devoj de la ĉiutaga vivo kaj ŝarĝo labora kaj studa mi iom-post-iom forlasis la E-lernadon ĝis mi tute ĉesis. Kiam mi,

preparante la vojaĝon, ekmemoris pri Esperanto, mi komprenis ke ĝi estas la perfekta solvo. Esperanto ebligas al mi kontakti japanojn en Japanio, viziti iliajn domojn kaj sperti Japanion de interne, ne kiel kutima turistino (eĉ sen mencii la ekonomian ŝparon...). Mi vigle revenis al la Esperanto-lernado kaj kontaktis israelajn esperantistojn, kiuj helpis al mi plani la vojaĝon kaj kontakti japanajn esperantistojn.



Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo
– Hagar en la centro de Oomoto

Kaj tiel, fine de septembro, mi komencis travivaĵon, unikan dum vivo: unumonata ekskurso en Japanio, mi sola. La vojaĝo estis fantazia. Mankas al mi vortoj [*eĉ hebree. AW*] por priskribi tiun travivaĵon. Sendube, mia sperto en Japanio estis signife pliintensigita dank' al Esperanto. Pri la tuta ekskurso kaj pri miaj multaj travivaĵoj mi povas skribi kompletan libron. Por IE mi provos koncizigi nur la travivaĵojn kiuj rilatas al Esperanto.

Kaj tiel, fine de septembro, mi komencis travivaĵon, unikan dum vivo: unumonata ekskurso en Japanio, mi sola. La vojaĝo estis fantazia. Mankas al mi vortoj [*eĉ hebree. AW*] por priskribi tiun travivaĵon. Sendube, mia sperto en Japanio estis signife pliintensigita dank' al Esperanto. Pri la tuta ekskurso kaj pri miaj multaj travivaĵoj mi povas skribi kompletan libron. Por IE mi provos koncizigi nur la travivaĵojn kiuj rilatas al Esperanto.

Tri partoj de la ekskurso rilatis al Esperanto: Oomoto, Hiroŝimo kaj Tokio. Ni komencu ĉe Oomoto. Post la kvar unuaj tagoj en la rava Kioto, mi veturis al la urbo Kameoka, kie troviĝas la centro de Oomoto. Kio entute estas *Oomoto*? Mallonge, tio estas religio bazita sur Ŝintoismo, sed kontraŭe al la politeisma Ŝintoismo, la Oomotanoj instruas ke ĉiuj dioj

devenas de unu supera Dio. Ili plue kredas, ke la dioj de la aliaj monoteismaj religioj – judismo, kristanismo kaj islamo – estas fakte la sama Dio, kaj tial, se oni kredas je Dio, ne gravas ĝia nomo. Tial, tre diference de la religioj konataj

Hagar prelegas dum la monata ceremonio de Oomoto en Ayabe



en nia lando, Oomotanoj akceptas kun amo kaj respekto la kredantojn de aliaj religioj, kaj eĉ kredas ke estas pli grave lerni pri aliaj religioj ol pri sia propra religio. Oni povus nur deziri tian sintenon ĉe aliaj religioj... Kadre de sia agado, Oomoto provas progresigi la mondan pacon. Pro la graveco de

Jerusalemo por multaj religioj, la Oomotanoj dediĉas specialan atenton al la israela-palestina konflikto. Estas mirinde kiel homoj de la alia flanko de la terглоbo tiome interesiĝas kaj zorgas pri la situacio en Israelo. Kaj kiel Oomoto rilatas al Esperanto? La Oomotanoj adoptis Esperanton kiel sian universalan lingvon en la jaro 1923, kaj de tiam ili progresigas la lingvon kaj multaj Oomotanoj ĝin lernas.

Mi gastis en la Oomoto-centro dum kvar tagoj, vizitante kaj la instrucentron en Kameoka kaj la religian centron en la urbo Ayabé. Mirinde gastigis min AGO Takashi, kaj dum kvar tagoj mi partoprenis preĝojn, renkontiĝis kun Esperanto-lernantoj kaj kun aliaj Oomotanoj. Mi partoprenis en tradicia te-ceremonio (vera ceremonio! Ne turismeca, kian oni povas partopreni kontraŭ pago, en grandaj turismaj centroj...). Mi vidis kiel oni preparas ceramikaĵojn karakterizajn por la regiono kaj kiel oni teksas ŝtofon laŭ tradicia maniero. Oni petis min paroli dum la monata ceremonio de Oomoto, rakonti pri mi kaj klarigi kio venigis min al Japanio, al E-o kaj al Oomoto.¹

Mi miris kial ili interesiĝas pri mi – unu el la multaj junulinoj kiuj vizitas Japanion – kaj Ago respondis, ke mia vizito estis speciala por Oomoto

¹ Vidu la originalan paroladon de Hagar en paĝo 16.

ĉar mi venis pro interesiĝo pri la japana kulturo, sed por lerni pri ĝi mi elektis ne la japanan lingvon sed *Esperanton*. Kvazaŭ japano kiu volas konatiĝi kun la Israela kulturo per Esperanto. Alia signifa rendevuo en mia tagordo estis kun la urbestro de Ayabe, kiu volis renkonti gaston el Israelo, pro ilia interesiĝo pri la konflikto kaj ilia agado por proksimigi israelanojn kaj palestinanojn.² Aldone mi havis la honoron konatiĝi kun tre interesa persono: la reprezentanto de la Dalai Lama en Japanio, kiu estis invitita al Oomoto por prelegi pri Tibeto. La persona renkontiĝo kun li estis fascina kaj ebligis al mi senpere konatiĝi kun la tibeta konflikto. Jen ankoraŭ io, kion mi neniam spertus sen tiu ĉi vizito.

Konfesinde, mi alvenis al Oomoto timeme, ĉar unuafoje mi devis vere komunikiĝi per Esperanto. Kiam antaŭe mi konversaciis Esperante en Israelo, mi uzis la hebrean kiam mankis al mi vorto aŭ vortumo. Mi sciis ke en Japanio mi povos fidi nur Esperanton. Mi ĝoje malkovris, ke la tasko ne estis tro komplika. Kvankam mi ne parolis flue kaj daŭre faris multajn erarojn, mi sukcesis komunikiĝi kaj eĉ fari tre interesajn konversaciojn. La vizito ĉe

Oomoto montris al mi aldonan flankon de Japanio kaj de la japanoj, kiun mi neniel povus renkonti sen Esperanto, kaj ebligis al mi sperti la temon de religio en Japanio, rava temo en si mem, el alia vidangulo.



De maldekstre: s-ino Marie-France Konde Rey, urbestro de Ayabe – s-ro YASUO Shikata, Hagar Lidor, s-ro AGOU Takashi, s-ro TOKIO Kanakogi

Noto de la redaktoro:

La artikolo bele demonstras kiel Esperanto povas esti ponto inter kulturoj kaj popoloj. Mi (kaj aliaj israelanoj) havis similajn spertojn dum mia peresperanta vizito en Japanio, sed Hagar esprimas ĝin tiel ĉarme kaj konvinke, ke eĉ ne-esperantistoj estos ravitaj kaj eble eĉ decidus eklerni la lingvon. Pro tio mi decidis prezenti ankaŭ parton de ŝia originala (hebrelingva) artikolo. La rakonto de Hagar estos daŭrigota en la venonta numero.

² Hagar ne estas la unua israela esperantisto ĉe Oomoto, sed ja la unua kiu estis invitita paroli dum la ceremonio kaj renkontiĝi kun la urbestro. [La redaktoro]

La originala parolado de Hagar Lidor por la ceremonio ĉe Oomoto

Karaj geamikoj,

Mi tre ĝojas esti ĉi tie kun vi. Mia nomo estas Hagar kaj mi loĝas en Israelo. Unue mi volas pardonpeti pro miaj eraroj – mi eklernis Esperanton nur lastatempe. Due, mi volas diri ke mi sentas nun grandan entuziasmon, ĉar ĝi estas mia unua vizito en Japanio kaj la unuan fojon ke mi parolas en Esperanto antaŭ tiom multaj homoj!

Kial mi decidis vojaĝi ĝuste al Japanio? Ĉar mi volis vidi kulturon kiu malsimilas al la mia kaj lerni pri ĝi. Mi legis multe pri la japana kulturo, kaj mi trovis belecon kaj ĉarmon en ĝi.

Ege plaĉis al mi la fakto ke en diversaj lokoj la kulturo povas evolui tute alie kaj varie. Mi venis ĉi tien ĉar mi volis plu lerni pri via kulturo kaj vidi per miaj propraj okuloj tion, pri kio mi legis. Malgraŭ la grandaj diferencoj inter niaj kulturoj, Esperanto povas transponti inter ni, kaj povas ebligi rektan komunikadon.

Oni diras en Israelo, ke turismi memstare en Japanio povas esti tre malfacile pro lingvaj bariloj. Sed mi sciis ke dank' al Esperanto mi povos varme komunikiĝi. Plue – per Esperanto mi povos lerni kaj ekkoni la veran Japanion, pli profunde ol faras la neesperantistaj turistoj. Tial mi tre ĝojas esti ĉi tie kaj vidi kiel E-o ebligas eklerni vere pri unikaj kaj foraj kulturoj.

Kiel kaj kial mi lernis Esperanton? Tute hazarde. Antaŭ unu jaro mi legis artikolon en iu loka gazeto pri Esperanto. Nur poste mi eksciis, ke tiu artikolo estis verkita sekve de la vizito de s-ro AGO

Takashi en Israelo. Ĉiukaze, tre plaĉis al mi la ideo de la lingvo kaj kiel ĝi transpontos inter homoj.

Mi forte kredas ke ni ĉiuj estas unue homoj, kaj ni devas vidi la komunan inter ni kaj trovi la oportunan vojon por komuniki egalece. E-o por mi estas ne nur lingvo: ĝi ankaŭ helpas al ni vidi la komunan inter la homoj. Iam mi ŝatus eĉ lerni la japanan lingvon, sed ĝis tiu feliĉa tago mi ĝojas ke ni povas uzi la neŭtralan internacian lingvon.

Do kiu mi estas? Mi rakontos iom pri mi mem. Mi aĝas 24 jarojn. Kiam mi finis altlernejon, je la aĝo 18, mi komencis la armean servon, kiel ĉiuj gejunuloj en Israelo, ĉar ekzistas deviga armea servo en mia lando. Post la servo mi lernis fizikon kaj matematikon en la Universitato de Jerusalemo. Sed tiam mi komprenis, ke malgraŭ la graveco de numeroj, mi preferas labori kun homoj. Do mi ŝanĝis direkton kaj nuntempe mi magistriĝas pri la temo “Solvo de konfliktoj”. Ĝi estas tre interesa kampo, kiu tuŝas diversajn fakojn kiel juro, psikologio, kulturo, religio ktp. Mia studado temas pri diversaj konfliktoj – ekde konfliktoj inter edzo kaj edzino aŭ inter najbaroj, ĝis grandaj konfliktoj, kiuj okazas inter ŝtatoj. De mia legado pri Japanio mi scias ke la metodoj por konfliktsolvado ĉi tie ege malsamas de tiuj de la okcidento. Mi komprenis ke en Japanio oni provas eviti laŭeble la uzadon de juĝejoj, kaj la nombro de la kazoj kiuj atingas la juĝejojn estas tre malgranda kompare al la okcidenta mondo, kie la

juĝistoj estas inundataj de dosieroj. En Israelo ekz., ĉiu juĝisto devas pritrakti pli ol du mil kazojn jare!

Ĝi signifas ke ofte oni ne povas dediĉi la bezonatan atenton al multaj kazoj. Tial ni provas trovi aliajn metodojn por solvi la problemon – mediacion aŭ arbitracion. Laŭ tiuj metodoj la kverelantaj flankoj elektas neŭtralulon, kiu helpas al ili atingi interkonsenton, aŭ en kazo de arbitracio, diktas al ili la solvon. Mi ĝojos dum mia ĉeesto en Japanio kaj en Ayabe plu lerni kiel en Japanio oni pritraktas la temon. Mi certas ke mi povas multe lerni de vi.

Kiel mi eksciis pri Oomoto kaj Ayabe?

Ankaŭ tio okazis tute hazarde. Kiam mi rakontis al miaj esperantistaj amikoj en Israelo ke mi veturas al Japanio, ili rakontis al mi pri tiu ĉi loko kaj kiom mirinda kaj

interese ĝi estas. Eran, komuna e-amiko de mi kaj de s-ro Ago, kreis la kontakton, kaj s-ro Ago invitis min gastigi ĉi tie. Mi estas tre ĝoja kaj tre danko pro la invito kaj pro la unika ebleco vidi kaj ekkoni Oomoto-n. Indas diri, ke speciale en mia kazo, mia vizito en Japanio ne povus esti kompleta sen la vizito ĉe Oomoto, ĉar mi fakte malkovris Esperanton per la gazeta artikolo verkita dank' al la vizito de s-ro Ago en Israelo!

Antaŭ ol fini mi volas denove danki vin por ĉio! Mi volas ankaŭ kapti la okazon kaj inviti vin ĉiujn viziti Israelon kaj Jerusalemon. Mi esperas ke kunlaboro inter Esperantistoj de la tuta mondo abundos kaj pligrandiĝos, kaj ke ni vidos kiel la tergloba estiĝas pli bona loko por ni ĉiuj.

Koran dankon pro via aŭskultado.

* Efektive Hagar prezentis iom modifitan version de tiu ĉi teksto, sed mi preferis publikigi la originalon verkitan de ŝi. [La redaktoro]

הגר לידור

החוויה האספרנטית שלי ביפן

הערת העורך: הכתבה ממחישה כיצד אספרנטו יכולה להוות גשר בין עמים ותרבויות. רשמים דומים חוויתי גם אני (וישראלים אחרים) כשביקרתי ביפן באמצעות אספרנטו, אולם הגר מעבירה את החוויה בצורה כה חגיגית ומשכנעת, שתקסים בוודאי גם אנשים שאינם דוברי אספרנטו ואולי אף תגרום להם לנסות להכיר את השפה. לכן בחרתי להביא בנוסף לתרגום גם חלקים מהכתבה המקורית. קריאה נעימה!

הכל התחיל לפני כמה חודשים. נכנס לי ג'וק לראש – אני רוצה לנסוע לטיול ביפן. ככל שקראתי יותר חומר על יפן, על היפנים ועל התרבות שלהם, רותקתי יותר ויותר, ורק חיפשתי לקרוא עוד. הרעיון לנסוע ליפן ולראות תרבות כל כך שונה וכל כך מרתקת כבש אותי לחלוטין. ואז התחלתי לחשוב, איך אני נוסעת ובאמת חווה את התרבות המיוחדת הזו בצורה הכי אמיתית שאפשר. הבנתי שלישון בבתי מלון ולעבור "מאטרקציה לאטרקציה" עלול לא לספק לי את החוויה שחיפשתי. ואז נזכרתי באספרנטו. התחלתי ללמוד אספרנטו בערך שנה קודם לכן. מאוד נהניתי מהלמידה דרך האינטרנט ואפילו הצלחתי להתמיד בכך במשך זמן מה, אבל אילוצי החיים והעומס בעבודה ובלימודים גרמו לי לזנוח את אספרנטו. עד שחזרתי לחלוטין. כשנזכרתי שוב בשפה בעת שהתחלתי לתכנן את הטיול ליפן, הבנתי שזה הפתרון המושלם. זו הזדמנות ליצור קשר עם יפנים ביפן, לבקר בבתיהם ולחוש את יפן מבפנים, לא כמו תיירת רגילה (שלא לדבר על החיסכון הכלכלי...). חזרתי ללמוד אספרנטו במרץ, ויצרתי קשר עם דוברי אספרנטו בארץ, שעזרו לי רבות

עם כל התכנונים ויצירת הקשרים עם תנועת האספרנטו ביפן. וכך, בסוף ספטמבר, יצאתי לי להרפתקה של פעם בחיים – טיול של חודש ביפן, לבדי. הטיול כולו היה מדהים. אין לי מילים לתאר את גודל החוויה. אין ספק שהחוויה שלי ביפן הועצמה באופן משמעותי בזכות הקשר הזה לאספרנטו. על הטיול כולו ועל החוויות הרבות שעברתי אני יכולה לכתוב ספר שלם. עבורכם, אנסה לתמצת כאן רק את חוויותי הקשורות באספרנטו.

מתוך כלל הטיול, היו שלושה חלקים שנגעו לאספרנטו: במרכז של אואמוטו, בהירושימה ובטוקיו. ונתחיל עם אואמוטו. אז מה זה בכלל אואמוטו? על רגל אחת, זו דת המבוססת על יסודות השינטו, אך בניגוד לשינטו הפוליתאיסטית, באואמוטו מלמדים שכל האלים הרבים הקיימים באים מאותו אל אחד עליון. הם מאמינים גם שהאלים של הדתות האחרות, יהדות, נצרות ואיסלאם, הם

למעשה אותו אל אחד, ולכן אין זה משנה מהו שמו של האל בו מאמינים, כל עוד מאמינים בו. לפיכך, באופן שונה מאוד מהדתות שאנחנו מכירים כאן בארץ, מאמיני אואמוטו מקבלים באהבה ובכבוד את בני הדתות האחרות, ואף מאמינים שחשוב יותר ללמוד על דתות אחרות מאשר על דתם שלהם. ועל זה אפשר רק לומר – הלוואי עלינו... כחלק מהפעילות שלהם הם מנסים לקדם את השלום העולמי. עקב החשיבות הגדולה של



FOTO: AJALA DANON

ירושלים עבור בני דתות רבות, הם מקדישים תשומת לב מיוחדת לסכסוך הישראלי-פלשתינאי. מדהים לראות איך אנשים שחיים בקצה השני של העולם כל כך מתעניינים ואכפתיים לגבי מה שקורה לנו כאן. ומה הקשר לאספרנטו? אואמוטו אימצה את האספרנטו כשפה האוניברסלית שלה בשנת 1923, ומאז היא מקדמת את האספרנטו, ורבים ממאמיניה לומדים את השפה.

התארחתי באואמוטו במשך ארבעה ימים, וביקרתי גם בקמאוקה, שם נמצא המרכז הלימודי שלהם, וגם באייבה, שם נמצא המרכז הדתי. התבקשתי לתת הרצאה קצרה בטקס החודשי שלהם, ולספר על עצמי ועל הסיבות שהביאו אותי ליפן, לאספרנטו ולאואמוטו. תהיתי מדוע מעניין אותם לשמוע עליי – בסה"כ עוד בחורה צעירה שבאה לטייל ביפן. למה אני כל כך מעניינת אותם? אגו הסביר לי בתשובה לתהייתי שהעובדה שבאתי ליפן מתוך עניין בתרבות היפנית, אולם כדי ללמוד עליה בחרתי לא ללמוד יפנית, אלא אספרנטו, הופכת את הביקור שלי למיוחד ומעניין עבורם. פגישה משמעותית נוספת היתה עם ראש העיר של אייבה, שהתעניין לפגוש מישהי שמגיעה מישראל, בגלל המעורבות שלהם בסכסוך והפעולות שהם עושים למען קרוב לכתוב בין ישראלים ופלשתינאים.

בנוסף, זכיתי להכיר בעת ביקורי אדם מעניין מאוד, הנציג של הדלאי-לאמה ביפן, שהוזמן לאואמוטו כדי להעביר הרצאה על טיבט. המפגש האישי איתו היה מרתק ואפשר לי להיחשף לקונפליקט סביב טיבט ממקור ראשון. עוד משהו שלא הייתי נחשפת אליו אלמלא הביקור הזה.

אני חייבת להודות שהגעתי לאואמוטו עם מעט חששות – זו הייתה הפעם הראשונה בה באמת הייתי צריכה לתקשר באספרנטו. בשיחות הקצרות שניהלתי לפני כן באספרנטו בארץ, עברתי

כל הזמן לעברית כשהיו חסרות לי מילים או כשלא ידעתי איך להתנסח. כאן ידעתי שאהיה חייבת להסתדר רק עם אספרנטו. לשמחתי הרבה, גיליתי שזה באמת לא עד כדי כך מסובך. נכון שלא דיברתי שוטף לחלוטין ועשייתי המון טעויות כל הזמן, אבל הצלחתי לתקשר, ואפילו לנהל שיחות מעניינות מאוד. הביקור באוואמוטו איפשר לי לראות צד נוסף של יפן ושל היפנים, אותו לא הייתה לי כל דרך לפגוש בלי האספרנטו, ולקבל זווית נוספת על נושא הדת ביפן, שהוא נושא מרתק בפני עצמו.

[...]

ברור לי ש"החוויה האספרנטית" ביפן הייתה חלק משמעותי מהקסם שהיה בטיול, ואני מרגישה בת מזל על שזכיתי להתוודע לעולם הזה ולהכיר את האנשים הנפלאים שעזרו לי כל כך, גם בארץ וגם ביפן. הדבר המרכזי שלקחתי איתי מהטיול הזה הוא התחושה הנפלאה שנותנת העובדה שאנשים זרים לגמרי מוכנים להשקיע כל כך הרבה כדי לעזור לזולת (ובמקרה הזה – לי), שלא על מנת לקבל תמורה. השאיפה שלי היא להחזיר להם על כל שעשו למעני בכך שאני אוכל לעזור הלאה, לאנשים אחרים, ולנסות להעביר הלאה את התחושה הנפלאה הזו.

La japana kontakto

Ajala Danon *

Elhebregis: Amri Wandel

MIA KONTAKTO kun Oomoto ekestis dank' al Esperanto kaj evoluis dum miaj du lastaj vizitoj en Japanio kaj la vizito de Ago-san en Israelo pasintjare. Ni ekplanis viziton al la centro de Oomoto en la urbo Kameóka (apud Kioto). Mia kunlaboranto en la planado kaj gvidanto dum la vizito estis TANAKA-san, la respondeculo pri eksteraj rilatoj. La celo de la vizito estis renkontiĝi kun la membroj kaj kredantoj, kaj konatiĝi kun la ĉiutaga vivo de Oomoto kaj kun la tradiciaj japanaj artoj, kiuj estas esenca parto de ĝi.

Vespere, post nia alveno, ĉiuj Oomotanoj kolektiĝis por bonvenigi nin, kun multe da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. La gajaj Oomotanoj petis nin rakonti pri ni – de kie ni estas, kial ni elektis Japanion, kion ni plej ŝatas en tiu lando ktp. Oni ankaŭ menciis Esperanton kaj ĝian rilaton al nia vizito. En la posta tago ni lernis pri la japanaj artoj: kaligrafio, aikido kaj te-ceremonio. Aparte la ĉi-lastaj fascinoj nin ĉiujn, ĉar ĝi okazis laŭ ĉiuj klaraj reguloj de la tradicia japana te-ceremonio. En la resuma renkontiĝo de la grupo, jam en Israelo, pluraj grupanoj diris, ke la vizito ĉe Oomoto, kiu eblis dank' al Esperanto, estis la plej speciala parto de la tuta vojaĝo, kaj ili ankaŭ interesiĝis pri Esperanto. Mi esperas plu venigi grupojn al Oomoto estontece.

* Ajala vivis en Japanio plurajn jarojn. Dum la lastaj 9 jaroj ŝi organizas kaj gvidas la ekskursojn "Japanio – alispeca travivaĵo", kiuj celas konatiĝi kun la Japana kulturo kaj tuŝi la kulturan magion kaŝitan sub la moderna Japanio, aldone al la kutimaj turismaj allogaĵoj.

EDZIĜO ne estas simpla kunvivado de viro kaj virino en Nepalo – ĝi estas kuniĝo de du familioj, du komunumoj kaj du societoj. Pro tio, en nia societo edziĝo estas persona, kultura kaj religia afero. Eble pro tio maljunuloj diras, ke Dio aranĝas edziĝon kaj ni nur sekvas lian deziron.

Okazis edziĝceremonio de mia kuzo antaŭ nelonge. Mi volus rakonti pri tio – kio estas eble tre komplika por eksterlandanoj.

La gepatroj de la viro trovis knabinon por li. Tradicie la gepatroj serĉas knabinojn por siaj filoj. Ili trovis kandidaton el samklasa familio. Tiel okazas en nia societo. La gepatroj pli vigle agas por siaj gefiloj. Ili serĉas knabinon por filo aŭ knabon por filino. Ili tiel aranĝas aferojn pere de iu peranto, kiu konas ambaŭ familiojn. Antaŭ eble 20 jaroj la gejunuloj ne havis rajton demandi al siaj gepatroj kun kiu li aŭ ŝi edziĝos aŭ edziniĝos. Simple okazis tiel ke la gepatroj decidis kaj ili obeis. Sed nun tia sistemo ne plu ekzistas, almenaŭ en la urboj. En la moderna vivo, la gejunuloj ne volas edziĝi kun nekonatoj. Do, la gepatroj unue diras al siaj gefiloj pri la proponoj kaj la gejunuloj decidas. Kun helpo de la gepatroj ili renkontiĝas, diskutas pri siaj profesioj aŭ estontaj vivoj kaj interkonsentas ĉu vere edziĝo eblas aŭ ne. Poste ili diras jes aŭ ne al siaj gepatroj. Kaj, samtempe, nun enamiĝo aŭ serĉo de fianĉo aŭ fianĉino ankaŭ estas kutima. Ili diras al la gepatroj pri siaj elektoj kaj plej ofte la gepatroj permesas edziĝi aŭ edziniĝi.

Do same okazis al ili. Ambaŭ interkonsentis kaj la gepatroj aranĝis doton de siaj gefiloj. Post interkonsento, la familio de la viro sendis grandan donacon – ĉirkaŭ 30 pladojn kun manĝaĵoj, dolĉaĵoj, fruktoj, vestaĵoj kaj kosmetikaĵoj – al la virino. Kune devas esti ruĝa pulovero kiu havas specialan signifon en la nepala kulturo. Estis fakte formala propono de la vira familio al la virina familio. Ŝi akceptas la donacon kaj metas la ruĝan puloveron sur sia fronto se ŝi vere konsentas edziniĝi.

Ĉi-foje ŝi akceptis ĝin. La familianoj de la virino donis luksan vespermanĝon al la propono-portantoj. La afero okazis unu monaton antaŭ la edziĝo. Jen, ili sekvis la tradician edziĝsistemon sed ili ja enmetis modernaĵon dum

la ceremonio. Tio jam estas modo en mia lando.

Dum la tago de la ceremonio, la viro iris kun granda grupo de ĉirkaŭ 60-80 familianoj kaj geamikoj al la hejmo de la virino. La gejunuloj plej multe partoprenas en tia procesio, kun belaj vestaĵoj. Li sidis en aŭto kaj aliaj aŭ piede marŝis aŭ veturis per buso. Akompanis ilin teamo de modernaj muzikistoj. La muziko estas sufiĉe brua, tamen.



La hejmo de la virino estis bele dekoraciita. La membroj de la virina familio akceptis la procesion kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ili donacis specialan paketon da nuksoj al la gastoj. La novedzino aperis kun la plej bela vestaĵo kiun ŝi trovis. Oni kutime vestas sin ruĝe – kun bele farita hararo, luksaj vestaĵoj kaj oraj ornamaĵoj. Troviĝas beligitoj, kiuj speciale laboras por la edziniĝontoj. Poste, la viro kaj virino estis sidigitaj apude. Oni metis oleo-lampon kun imago de la dio de bonaŭguro. La pastro preĝis al dio por ke la kuna vivo de la geedzigoj estu sukcesa kaj feliĉa. La virino donis floran girlandon al la viro kaj li donacis al ŝi oran kolĉenon. Poste ili reciproke donacis ringojn. Kutime, la virino devas tuŝi la piedon de la viro per sia frunto, sed tio malofte okazas nuntempe.

La virino poste donis specialan nukson al siaj familianoj kiel la lastan donacon, kaj la familianoj donacis al ŝi diversajn varojn, precipe tradiciajn ujojn por kuirejo, kiel lastan donacon. Ili volas ke ŝi bone kuiru manĝaĵojn

por sia nova hejmo. Homoj kutime fariĝas emociaj kaj la virinoj eĉ ploras. Edziĝo ja estas ĝojo sed disiĝo de sia familio ankaŭ estas doloro.

Antaŭ la fino la gepatroj de la virino “donacis” la filinon al la viro kaj petis promeson – atestite de Dio – ke li donos al ŝi feliĉon kaj amon kaj subtenon dum ĝojo kaj malĝojo. Sur la strato, la pastroj de la vira familio



Antaŭ la adiaŭo

kaj de la virina familio konversaciis antaŭ la templo loka, kaj la vira familio garantiis ke ili bone zorgu pri la bo-filino kaj donu al ŝi la plej grandan eblan feliĉon.

Post la kultura evento kiu eble daŭris du horojn, la viro revenis kun la virino per aŭto kaj la akompanantoj simile sekvis la aŭton, per buso. Muziko kaj iomete da dancado en la strato montris al la najbaroj

ke ili estis feliĉaj. Ŝi kunportis multe da donacoj kiun ŝi ricevis dum la festo kiu okazis en sia hejmo antaŭ unu semajno.

Sekvantan tagon okazis gaja vespermanĝo. Venis pli ol 1,200 gastoj! Ĉeestis familianoj de la gepatroj de la viro, liaj geamikoj kaj aliaj. La gastoj ricevis manĝon kaj alkoholaĵon. Multaj drinkis ĝis ili preskaŭ kuŝis sur la planko. Post du tagoj sekvis alia programo. La familio de la edzino venis por scii ĉu ŝi bone fartas en sia nova domo. Ili kunportis multe da manĝaĵoj kaj aliaj donacoj por ŝi. La vizitantoj ricevis denove bonan vespermanĝon. Poste, la virina familio invitis la bofilon al la hejmo de la virino por vespermanĝo. Li kunportis nuksojn por donaci al la familianoj de la virino.

Travivaĵoj en Nepalo

Amri Wandel

PARTO I – MAJESTA HIMALAJO

1. Junula amo: Sagarmatha

Mia amafero kun Himalajo komenciĝis antaŭ dudek kvin jaroj, kiam mi partoprenis du sciencajn konferencojn en Barato. Mi kaptis la okazon por realigi la revon de multaj aventuremaj gejunuloj: grimpi la plej altan

monton en la mondo. Kompreneble ne ĝis la pinto – tio bezonas specialajn kvalifikojn, grandan delegacion kaj multege da mono. Temas “nur” pri montara migrado en la fama trako ĝis la Everesto-bazkampo, je alteco de 5,400 m. Ne havante multan tempon, pro la konferenco, mi elektis la pli rapidan vojon: flugi al la vilaĝo Lukla, tiel ŝparante unu semajnon da migrado el la vilaĝo Ghiri, je la ŝoseo-fino en la Katmandu-valo. La “flughaveno” de Lukla estas mallonga strio kiu finiĝas per kruta valo, kaj estas ofte fermita pro malbona vetero. Lukla troviĝas je alteco de 2,000 m., do necesas grimpi tri mil metrojn.

Mi entuziasme penetris la majestan landon de Sagarmatha (la nomo de Everesto en la nepala lingvo, signifanta “frunto de l’ĉielo”; Esperante oni ofte uzas la nomon Ĉomolungmo, kiu devenas el tibeta lingvo kaj signifas “Mondpatrino”). Plenpulme enspirante la freŝan mont-aeron, mi admire rigardis la imponan pejzaĝon. La trako pasas laŭlonge de la valo de la rivero *Dud-kozi* (‘lakta rivero’) kies nomo devenas de la laktece-azura koloro de la akvo (rezulte de la mineraloj solvitaj en ĝi). La pado de tempo al tempo transiras la riverojn sur pendantaj pontoj kaj foje pasas interesajn Sherpa-vilaĝojn. La unua kaj plej granda el ili estas la fama *Namche Bazar*, je alteco de 3,000 m. – efektive granda regiona bazaro. Tie oni devas ripozi dum du tagoj por permesi al la korpo adaptiĝi al la alteco. Ĉe la horizonto jam videblas la neĝkovritaj imponaj montopintoj de Amadablan kaj Lotze. Pli alten oni devas progresi atente: ne pli ol 500 m. da alteco ĉiun tagon, por eviti la altec-malsanon. Pli alte troviĝas granda monaĥejo kie multaj migrantoj vizitas kaj ricevas budhisman benon de la monaĥestro – eble ne helpos, sed certe ne damaĝos. Ĉi tie, je alteco de 4,500 m., la aero havas nur duonon de la oksigenkvanto al kiu ni estas al kutimiĝintaj je la marnivelo, kaj la korpo rapide laciĝas. La lasta parto de la vojo grimpas modere laŭlonge de la glaci-rivero Khumbu. Fine, unu semajnon post la foriro de Lukla, mi alvenis al *Kala Patar*, (nepale: nigra ŝtono), monteto de kies pinto oni havas bonan vidon de Everesto.



Ĝi estas nur 300 m. pli alta ol la ĉirkaŭa altebenaĵo, sed la grimrado ŝajnis al mi ege malfacila. Je tiu alteco oni sentas kvazaŭ la gamboj estas el plumbo... Kiam fine oni atingas la pinton de Kala Patar, pluraj migrantoj seniluziiĝas pro la aspekto de la plej alta monto de la mondo. Kvankam ĝi ja aspektas pli alta ol ĝia ĉirkaŭaĵo, la diferenco ne estas impone granda, kaj ĝi ofte aspektas kalva, nude roka, sen la admirinda blanka neĝkovrilo de ĝiaj najbaroj.

Mi turniĝis komencante la 3,000-metran descendon al Lukla. La revenvojo daŭris du longajn kaj lacigajn tagojn, kaj kaŭzis dolorajn gambojn. "Sahiba (*mastra*) genuo" nomas tion la loka Sherpa-popolo, aludante al la turistoj kiuj ne estas alkiutimiĝintaj al la longa descendo: la plej bona amiko dum la descendo estas... via migrad-kano. Alveninte al Lukla por la reflugo al Katmandú atendis mia flugbileto, sed ne la aviadilo. Pro malbona vetero ne alvenis aviadilo dum pluraj tagoj, kaj centoj da migrantoj atendis por reflugi al Katmandu. Fine, post kvartaga atendado, pliboniĝis la vetero kaj kelkdekoj da bonŝanculoj trovis lokon en la unua aviadilo. Dum la duonhora flugo al

Katmandu mi adiaŭis la reĝajn blankajn pintojn kiuj klare videblis de la aviadila fenestro. La konferencon en Nov-Delĥio mi maltrafis, sed bonŝance mia prelego okazis en la sekva konferenco, en Bengaluro. Tie mi renkontiĝis kun du kolegoj, kiuj faris la saman migradon kelkajn tagojn pli frue ol mi...kaj ili rakontis al mi ke en la okcidento



de Nepalo ekzistas montmigrado kiu estas ne malpli bela, varia, impona kaj alta ol la Everest-migrado. Mi tuj decidis ke en la plej proksima okazo mi iros tien. Mi ne imagis ke tiu okazo atendos 25 jarojn, sed fine ĝi venis.

2. La lasta ĉirkaŭmigrado de Anapurna

Hinda profesoro, kolego el mia esplorkampo, organizis grandan internacian konferencon pri nigraj truoj en Kolkato, kaj invitis min prezenti la

malferman prelegon. Krom la prestiĝa prelego logis min malnova amo: Himalajo...

Kvankam Everesto estas la plej fama monto en la mondo, ne malpli populara pilgrimejo por montamantoj estas la majesta montara sanktejo de *Anapurna*. La kulmina sperto por mont-migrantoj estas la malfacila sed rava trisemajna rondiro ĉirkaŭ la eterne neĝkovrita Anapurna-montaro. Multaj generacioj de montmigrantoj trapaŝis tiun trakon, unu el la plej variaj, belaj kaj imponaj migradoj de la mondo, pejzaĝe, naturece kaj kultur-etne. La migrado startas proksime de la urbo Pokhara, okcidente de Katmandu. La komenco de la trako pasas tra la verdaj valoj ĉe la piedo de la montaro. Sekve mi grimpis laŭ la vilaĝaj antikvaj vojetoj, tra daŭre ŝanĝiĝantaj pejzaĝoj kaj flaŭro, ĝis la minaca montpasejo Thorong-La, kiu defias la migrantojn je alteco de 5,420 metroj inter la okmil-metraj neĝaj pintoj de Anapurna kaj Daulaghiri. Ne malpli impona ol la pejzaĝa beleco estas la etna varieco. La vojo serpentumas tra dekoj da vilaĝoj, inter kiuj migrantoj dividas la mallarĝajn padojn kaj pendo-pontojn kun vilaĝanoj kaj azenaj karavanoj. La alta montara murego izolis la vilaĝojn dum generacioj, konservante la etnan kaj kulturan unikecon: la valaj kamparoj de Besisahar kaj Chame tre varias de la tibetaj poefag*-paŝtistoj de la altaĵoj de Manang kaj Mustang. La monaĥojn de la alta, spirita, templo-plena pilgrimejo Muktinath anstataŭas la okupitaj komercistoj de la materia distriktcentro Jomsom, je distanco de nur unu tago piede kaj mil metroj da kruta descendo. Tamen, por multaj vizitantoj kaj migrantoj, eble la plej speciala sperto en la Anapurna-montaro estas la sento ke sub la majestaj montpintoj preskaŭ haltas la fluo de la tempo. La montaro malkaŝas siajn trezorojn nur al tiuj kiuj scipovas ilin serĉi pacience, tradicie pilgrimante laŭ la antikvaj vojetoj. La serena silento de la neĝaj pintoj, aŭ la fora tondrado de la laktkoloraj torentoj tra la profundaj valoj plenigas vian animon je admiro, trakvilo kaj sento de eterneco, simile al la daŭra flirtado de la buntaj preĝflagoj en la vento, la turnado de la preĝradoj kaj la senfine ripetiĝanta preĝa mantro de la monaĥoj: *om-mani-padme-hum*.

Sed ankaŭ la ŝajne eterna trankvilo ekŝanĝiĝas. Dum la lastaj jaroj, novaj vojoj estas konstruitaj laŭ la krutaj valoj. La migrantoj ne plu devas

* **poefago**: gruntbovo. Specio de bovo, vivanta precipe en Tibeto (angle: *yak*).

komenci la ducent-kilometran Anapurna-rondmigradon de Pokhara kaj eĉ ne de la tradicia starto-punkto – la granda vilaĝo Besisahar. Jam de kelkaj jaroj ĵipoj atingas Kudhi, dek kilometrojn pli norde, kaj lastatempe oni pretigas ĵipvojon – survoje mi vidis ĝin konstruata de nepalaj laboristoj – kiu atingas pliajn dudek kilometrojn, ĝis la vilaĝo Jegat. Ankaŭ aliajn partojn de la tradicia rondmigrada trako jam eblas trapasi per motorcikloj kaj ĵipoj, kiel la vojo inter la vilaĝoj Pisang kaj Manang, kaj baldaŭ oni kompletigos okdek-kilometran ĵipvojon kiu ligos la izolitan pilgrimejon Muktinath, je alteco de 3,800 m., ĉe la piedo de la minaca montpasejo Thorong-La, kun la fino de la trako, ĉe la vala vilaĝo Beni, sur la ĉefŝoseo al Pokhara. Ofte mi aŭdis en tiuj partoj de la pado la bruon de motorcikloj kaj ĵipoj, kiuj konkurencas kun la sonorilado de la azenkaravanoj. La tempofluo akcelas sian ritmon laŭ la bruoj de la modernaj motoroj kaj la tamburado de la pneŭmatikaj marteloj kiuj gravuras novajn vojojn tra la klifaj muregoj. Tio aldoniĝas al la aviadila



Budhisma preĝ-sankejo survoje al Thorong-La

surteriĝejo en Jomsom, kiu funkcias jam de jaroj, kaj por multaj vojaĝantoj mallongigas la unu-semajnan migradon al tridek-minuta flugo ĝis aŭ de Pokhara. Baldaŭ la serenajn silenton anstataŭos ĵipaj kaj motorciklaj knaroj, kaj la montaraj vilaĝoj ne plu restos izolitaj insuloj de trankvilo. La mistero kaj sereno malaperos kune kun la tradiciaj

migrantoj kaj montgrimantoj. Ilin anstataŭos la modernaj turistoj, tiuj kiuj alvenas aviadile aŭ per klimatizitaj aŭtobusoj, kaj migradas precipe inter la flughaveno aŭ stacidomo kaj la luksa hotelo.

Progreso kaj evoluo ne estas haltigeblaj, kaj verŝajne ankaŭ ne haltigindaj. Ili sendube modernigos kaj faciligos la vivon de la lokaj enloĝantoj, sed samtempe ili aŭguras la lastan ĉirkaŭmigradon de Anapurna.

(Daŭrigota.)

En genraj pronomoj la angla havas ĉiujn eblecojn

ĉiu 'mi' – en verbo

estas ĉia genra ebleco

kaj ĉiu femala 'vi' estas maskla 'vi'.

kaj ĉiu 'mi' estas sengenra

kaj ne estas diferenco inter femala kaj maskla 'vi'

kaj ĉiuj aferoj estas ĝi – nek viro nek virino

ne necesas pensi antaŭ ol pririlati sekson

la hebrea estas seksmaniulino

la hebrea diskriminacias por la bono aŭ malbono

komplimentas, privilegias

havante longan konton ekde l' diasporo

en pluralo estas prefero-rajto al ili-masklo

kun multe da nuancado kaj kaŝita sekreto

en singularo la ŝancoj egalas

kiu diris ke jam tro malfruas?

La hebrea estas seksmaniulino

ŝi volas scii kiu parolas

preskaŭ vidaĵo preskaŭ bildo

kio estas malpermesita en la tuta Biblio

almenaŭ vidi la sekson

la hebrea ŝtelrigardas tra la truo de l' seruro

samkiel mi faris al via patrino kaj al vi

kiam vi duŝis tiam en la barako

via patrino havis grandan pugon

sed mi neniam ĉesis pensi

la tagoj pasis kune kun la duŝoj

vi restis maldika sapumita knabino

poste vi ambaŭ ŝtopis ĉiujn truojn

vi ŝtopis ĉiujn breĉojn

la hebrea ŝtelrigardas vin tra la truo de l' seruro

la lingvo vidas vin nuda

mia patro ne lasis min vidi

li turnadis la dorson dum li pisis

עברית

בשמות מין יש לאנגלית כל האפשרויות

כל אני – בפעל

הוא כל אפשרות במין

וכל את היא אתה

וכל אני הוא בלי מין

ואין הבדל בין את ואתה

וכל הדברים הם זה – לא איש לא אשה

לא צריך לחשב לפני שמתיחסים למין

עברית היא סקסמניאקית

עברית מפלה לרעה או לטובה

מפרגנת נותנת פריבילגיות

עם חשבון ארף מהגלות

ברבים יש זכות קדימה להם

עם הרבה זקות וסוד כמוס

בניחוד הסכויים שונים

מי אומר שכלו כל הקצים

עברית היא סקסמניאקית

רוצה לדעת מי מדבר

כמעט מראה כמעט תמונה

fragmento el la

hebrelingva originalo

mi neniam vidis lin vere bone
 li kaŝadis la sekson
 samkiel pluralo kaŝas virinon
 samkiel publiko estas masklo en pronomoj
 samkiel vorto estas masklo kaj femalo
 ne estas aliaj aferoj krom tiuj dolĉaĵoj
 la hebrea estas sinlavanta virino
 la hebrea estas pura Bat-Ŝeva
 la hebrea estas skulptaĵo senriproĉa
 ŝi havas malgrandajn belpunktojn kaj naskiĝo-signojn



ju pli ŝi maturiĝas des pli ŝi belas
 ŝia prijuĝo estas foje prahistoria
 tia neŭrozo estas tamen bonaĵo
 diru al mi maskle diru al mi female
 ĉiu mi knabeca estas antaŭfekundigita ovolo
 sekso estas preterpasebla
 sekso estas pricedebla
 ĉu sekso kokida estas divenebla?
 La homo kiun la naturo kreas
 antaŭ ol stampiĝi per deklinaciita verbo.
 Memoro estas masklo
 kreanto de genroj
 genero principas

ĉar ĝi estas la vivo
 la hebrea estas seksmaniulino
 kaj tio kion diros grumble feministinoj
 kiuj serĉas eksciton ekster la lingvo
 per intonacio kiu ebligas interpreton
 signoj nur de masklo kaj femalo en frazo
 donos strangajn seksajn rilatojn
 ĉe ĉiu femalo signon, ĉe masklo signon malsaman
 eĉ kiam ĉiu verbo kaj konstruaĵo estas signita
 kion faras la viro al la virino
 kion li rricevas
 kian forton ŝi aplikas sur lin
 kaj kiu signo estas donata al la objekto

kaj al la abstrakta substantivo kaj al la vorteroj
ni ekhavos ian ludon de naturo
anima okazaĵo kiel juna arbaro
ludon de ĝeneralaj naturfortoj
el kiuj fontas ĉiuj detaloj
ĝeneralajn signojn por ĉiaspecaj eventoj
kiuj eble okazos iam-tiam
rigardu kian korpon havas la lingvo kaj mezurojn
nun amos mi ŝin sen langokovro.

Claude Piron – amiko de ISRAELA ESPERANTISTO

Doron Modan

ĈIU PLIA vorto pri la karmemora Claude Piron kaj pri tio, kion li signifis por la Esperanto-movado, nur malgrandigus lian meritegon. Mi povas nur menciigi belajn rememorojn de lia sindona kunlaboro, kiun mi ĝuis dum mia redakto-periodo de tiu ĉi revuo, en 2001–2007.

Israela Esperantisto ne estis tre konata inter la Esperantaj revuoj. Tamen, por bone komenci mian redaktorecon, mi aŭdacis (ĉu tro memfide?) skribi al Piron la veron: ke mi bezonas elstaran kontribuon por “festi” mian unuan numeron. Unu monaton antaŭe mi ĉeestis lian neforgeseblan prelegon en la Strasburga IJK pri la temo: “Kial mi kredas je Esperanto?”, kaj do mi petis ricevi la tekston de tiu prelego. Nekredeblas, sed tuj la postan matenon mi malkovris en mia retmesaĝilo malplenan mesaĝon, kun la alkroĉita plena teksto de la petita prelego! Estas vere, ke ĝis kiam IE revenis de la presejo, *Revuo Esperanto* sukcesis antaŭi nian gazeton je 2-3 semajnoj, aperigante la saman tekston, pro kio mi ege frustrigis... Sed fakto restas fakto, ke Piron elmontris grandan bonvolon sendante lian tekston al malgranda revuo, jam unu tagon post mia peto. (Tiamaniere mi lernis kiom gravas ekskluziveco al serioza gazeto, kaj en la postaj numeroj mi provis insisti pri ekskluzivaj kontribuoj, kutimo



kiu ekzistas ĝis nun.) Por la posta numero Piron jam proprainiciate (!) sendis al *Israela Esperantisto* prilingvan artikolon, kiu rebatas iun reformeman artikolon, kiu aperis en nia gazeto. En la lastaj nemultaj jaroj ekde tiam aperis liaj pliaj tri eroj. Lia vasta kaj bonega eseo estis “Ĉu la jida influis Esperanton?”. Mi memoras ke li donis al mi sian konsilon pri la demando, kie ekzakte finiĝu la unua parto de la eseo (ĝi aperis en du sinsekvaj numeroj), kaj mi konstatis, ke lia konsilo tiurilate ja estis ege sukcesa el redakta vidpunkto. En alia numero, aperis lia tre favora letero pri nia gazeto.

Sed ĵus unu monaton aŭ du antaŭ lia tro frua forpaso, mi denove turnis min al Piron, petante lin verki ion pri la “estonto de Esperanto”. Li respondis tuj, dirante ke li ne povas promesi ion ajn, kaj demandante pri la limdato. Kelkajn tagojn antaŭ la limdato alvenis surprize lia belega teksto. Kiom ironie estas, ke verŝajne lia lasta artikolo en Esperanto, aperis ĝuste sub la titolo “la *estonto* de Esperanto”.

Iujn tagojn post lia forpaso, ni aŭdis de Boris Kolker (alia eminenta amiko de nia gazeto, espereble por ankoraŭ multaj bonaj jaroj), ke la avo de Claude Piron estis sefarda judo. Mi ne scias ĉu pro tio Piron havis specialan rilaton al Israelo, aŭ ĉu li subite ekŝatis nian revuon en la lastaj jaroj, sed sendube ni dankas lin pro tio, ke li tiom malavare dividis kun ni sian genion kaj klarvidon. Estu lia memoro benata !

“Viro revenis hejmen de la laboro”

Aperinta en la Interreto. Esperantigis: Josef Ŝemer

Unu tagon fruvespere revenis la viro hejmen de la laboro kaj trovis la tutan hejmon senorda. Liaj tri infanoj, ankoraŭ en piĵamoj, ludis ekstere en la koto, ĉirkaŭitaj de saketoj de frandaĵoj dise forĵetitaj en la antaŭa korto. La pordo de la aŭtomobilo de lia edzino estis malfermita, samkiel la hejma pordo.

Enirinte la hejmon li vidis ke la ĥaoso estis multe pli granda. La lustro estis forĵetita surplanke kaj la enireja mato kuŝis ie interne de la ĉambro. En la salono la televido funkciis tre laŭte kaj la ĉambro estis plena de infanludiloj kaj diversaj vestaĵoj. La kuireja lavkuvo estis plena de manĝiloj. Sur la marmorplato kuŝis disigitaj restaĵoj de la matenmanĝo. La nutraĵoj de la

hundo estis disĵetitaj sur la planko kaj rompita glaso kuŝis sub la tablo. Krome, staketo de sablo troviĝis apud la malantaŭa pordo.



Li rapide supreniris la ŝtuparon, pretersaltante kromajn ludilojn kaj stakojn da vestoj, serĉante sian edzinon. Li estis tre zorganta, timante ke eble ŝi malsanas aŭ eble io malbona okazis al ŝi. Li eniris la dormejon kaj trovis ŝin kuŝanta en la lito, ĝu-leganta romanon, ankoraŭ en piĝamo. Ŝi rigardis lin, ridetis kaj demandis kiel pasis lia tago. La edzo estis plene konfuzita kaj demandis ŝin: “Kio okazas ĉi tie hodiaŭ?”

Ŝi ridetis al li denove kaj respondis: “Ĉu vi memoras, ke ĉiutage, kiam vi revenas de la laborejo, vi demandas min: ‘Kion diable vi faris hodiaŭ?’ ”

“Jes,” respondis la viro plene ŝokita.

Diris la edzino: “Do, **hodiaŭ** mi **ne** faris **tion**.”

Memorinda momento de Roterdama UK

aŭ: kiel mi gvidis la kantadon de la himno

Enrica Arbib

TIO ESTIS la tagon post la aliĝo. Mi alvenis al la inaŭgura ceremonio en la grandega salono, plen-plena de samideanoj. Mi eniris de malantaŭe, kaj tie mi trovis seĝon. Mi ne sukcesis vidi la podion, ĉar la salono estis plene. Sed almenaŭ estis ekranoj en ĉiuj anguloj, per kiuj ni povis vidi ĉion. De mia loko mi povis vidi miajn konatinojn Esti kaj Nava-Elvire, kaj ni ĝoje salutis unu la alian.

Mi estis tre emocia esti tie, kaj mi rigardis la ekranon apud mi. Multaj gravaj homoj de UEA parolis, poste virino kun junulo kantis per ĉiela voĉo. Nun mi estis vere scivola rigardi vive la koncerton. Do mi ekstaris, kaj nur tiumomente mi ekkomprenis, ke neniu el tiuj, kiuj staris sur la podio, vere estis en la halo. Mi komencis ŝerci kaj ridi kun miaj najbaroj, dirante “la Estraro de UEA malaperis!” (rememorante la rakonton “Gerda malaperis”).

Evidentiĝis, ke la Estraro estis en alia halo, salonego Zamenhof, kaj kiam la salono pleniĝis, kaj ne plu restis loko, oni direktis la homojn en la alian grandan halon, de kie la ceremonio estis videbla nur per ekranoj. Parenteze, ĉeestis la vidvino de la fama e-isto Lapenna, ĉarma virino, kiun

mi memoris de mia lasta UK en Florenco. Ankaŭ Louis Zamenhof, la nepon de d-ro Zamenhof, kiu ankaŭ ĉeestis, mi memoris de tiu Kongreso.

Mi prenis etan paŭzon de la paroladoj, kaj mi iris en alian salonon por trinki ion. De tie, mi povis rigardi la homojn, kiuj sidis en la salono kun la ekranoj. Kiam mi vidis, ke la esperantistoj leviĝas por kanti la himnon, kune kun la homoj kiuj sidis en la ĉefa halo, mi revenis al mia loko. Sed pro iu problemo, la sono de la ekranoj ĉesis funkcie, kaj la homoj staris konfuzitaj sen scii kion fari sen sono. Mi ekkuraĝis: mi havis la vortojn de la himno en la Kongresa Libro, do mi stariĝis antaŭ la granda publiko (ĉirkaŭ 500 homoj), kaj diris al ili: “Kantu kune!”. Mi komencis gvidi la kantadon de la himno, kaj kiam la unua linio de la publiko komencis kanti, ĉiuj esperantistoj ekkantis kune. Kvankam la ekranoj ne funkcieis, ĉiuj kantis ĝoje kaj kontente.

Festparolado de Prof. D-ro Humphrey Tonkin dum UK



Agado de ELI dum 2008

J. Ŝemer, A. Wandel

televido

– En junio estis prezentita (kaj 7 pliajn fojojn ripetita) en la kanalo de la *Komunuma televido* 12-minuta filmo pri la UK, okazinta en 2007 en Jokohamo. Produktis ĝin nia samideano **Gian Piero Savio** kadre de sia agado en la grupo de la komunuma TV de Ramat-Gan.

– En decembro oni prezentis en la televida kanalo 23 mallongan intervjuon pri Esperanto, partoprene de du israelaj esperantistoj (**Joela Egozi** kaj **Josef Ŝemer**). Ĝi estis parto de la duonhora programo por plenaĝuloj *Ha-moadón*.

radio kaj gazetaro

– En aprilo **Jehoŝua Tilleman** estis intervjuata pri E-o en la radio-programo de la tre populara intervjuisto Gabi Gazit ĉe la stacio *Radio Leló Hafsaká*.

– En la sama monato Esperanto aperis en la radio-programo *Ŝe'elá Ŝel Tá'am* (ĉe la unua reto de *Kol Israel*), en kiu la aŭskultantoj anticipe skribas al la radio, mendante specifan kanton. Ĉi-foje iu sinjoro petis aŭdigi “ion en E-o”. Tiam la prezentisto Ĥajim Kejnán voĉlegis sufiĉe longan tekston pri Esperanto kaj Zamenhof, prenita tutcerte el iu

enciklopedio. Poste ili aŭdigis la himnon, kantitan de la nederlanda koruso Akordo.

– Ankaŭ okazis en aprilo: **Doron Modan** telefonis malfrue-nokte al la radio-programo de Moŝe Timor en *Kol Israel* (dua kanalo) kaj sukcesis paroli pri Esperanto dum sufiĉe longa tempo.

– En la gazeto *Modi'in News* (la plej granda gazeto de la urbo Modi'in kaj la ĉirkaŭaĵo, kiu aperas en pli ol cent mil ekzempleroj kaj ankaŭ rete) oni aperigis dupaĝan intervjuon kun **Amri Wandel**; E-o estis detale kaj favore menciita.

2 gajnintoj de premioj

Dum la ĉi-jara Universala Kongreso en Roterdamo okazis la tradicia programero “Belartaj Konkursoj”. En ĝi oni anoncis pri la gajnintoj de premioj laŭ la diversaj branĉoj. Inter la ĉi-jaraj gajnintoj estis du israelanoj: **Luiza Carol** kaj **Mikaelo Giŝpling**. Mikaelo ricevis



Teatraĵo dum Landa Kunveno: Tom, Adam, Esti kaj Gian Piero

la unuan premion en la branĉo *poezio*. Luiza ricevis la duan premion en la branĉo *eseo*. Jen honoro al nia israela E-movado, sed temas antaŭ ĉio pri honoro kaj granda sukceso de Luiza kaj Mikaelo mem. Ni gratulas ilin!

Landaj Kunvenoj de ELI

En *junio* kunvenis en Tel-Avivo 46 e-istoj por ĝui riĉan kulturalan programon. Okazis kelkpersona teatra prezentaĵo, prelego, kvizo, kantado kaj pianludado, kontribue de Helena Goldinova, Gian Piero Savio, Tom Juval, Oded Gilad, Adam Rajzen kaj Esti Saban. En *decembro* okazis la jarkunveno de ELI; la 48 partoprenantoj aŭdis raportojn, debatis pri la agado kaj spektis varian programon kontribue de Oded Gilad, Doron Modan, Enrica Arbib, Luiza Carol, Hagar Lidor kaj Ajala Danon.

Lokaj grupoj

Daŭre okazas la agado en niaj tri lokaj grupoj:

– La tel-aviva klubo renkontigas 10-25 samideanojn ĉiumarde (15 averaĝe). Organizanto: Josef Ŝemer.

– La Norda Grupo renkontiĝas unu fojon monate en la hejmo de Martha Otto. Organizanto: Jehoŝua Tilleman. Ĉi-jare ili renkontiĝis 8 fojojn.

– Ankaŭ la jerusalemanoj kunvenas ĉiumonate, en la hejmo de Cvi-Tsuguya Sadan-Sasaki. Ili kunvenis 9 fojojn.

Kursoj

– En marto 8 gelernantoj finis en T-A la kurson de Esperanto gvidatan de **Doron Modan**. En novembro komenĉiĝis samloke nova kurso, gvidata de **Josef Ŝemer**. Partoprenas ĝin 9 personoj.

– Kelkaj dekoj da israelanoj lernas nuntempe Esperanton per la interreta

kurso *lernu!*. ELI kreas skriban kontakton kun ili sed tre malmultaj reagis. La plimulto de tiuj memlernantoj ĉesas lerni post nelonga tempo.

Tiu ĉi reta kurso ekzistas jam de kelkaj jaroj sed nur en 2008 ni komencis ligi kontakton kun ĝiaj lernantoj.

Junularo agadas

Dum la nuna jaro okazis pluraj kunvenoj en la hejmoj de la membroj, kaj du ekskursoj de REVI (*Rondo de*



Kunveno de JELI post la Landa Kunveno

E-Vojaĝantoj en Israelo), organizitaj de **Amri Wandel** – unu en junio al la Judea dezerto, kaj la alia en decembro al monto Karmel.

Pli ol dek membroj de JELI partoprenis la unuan Mezoriantan Esperanto-Kunvenon, de kiu la prezidanto de JELI,

Tom Juval, estis kunorganizanto. (Vidu raporton en paĝo 9 kaj foton sur la fronta kovrilo.)

Azia Movado

Rezulte de plurjaraj klopodoj de Amri Wandel, ELI estis invitata aliĝi al la Komuna Azia Esperanto Movado (KAEM). **Esti Saban** reprezentis ELI en la Azia Kongreso en Barato kaj en la KAEM-kunsido en Roterdamo. (Vidu la raportojn en paĝo 10.)

KIES

La 9-a Komuna Israela Esperanto-Semajnfino okazis en oktobro, unuafoje dum tri tagoj, en la druza vilaĝo Bet-Ĝan. Vidu detalan raporton tuj poste.

La 24-a Internacia Libro-Foiro

Sekve de la sukceso de sia partopreno en la Librofoiro en 2007, ELI aliĝis al la 24-a Foiro kiu okazos la 15–20-an de februaro 2009 en Jerusalemo (kunordigas: Amri Wandel). Estis mendita budo, ELI aperos en la oficiala katalogo, kaj estis aprobata publika prelego pri Esperanto.

La 9-a KIES en Bet-Ĝan

Amri Wandel

NE PLU necesas prezenti KIES (la *Komunan Israelan Esperanto-Semajnofinon*) – dum la lastaj ok jaroj ĝi okazis regule ĉiujare (unu jaron eĉ dufoje) kaj fariĝis ŝatata parto de nia jara agado. KIES okazas ekde la jaro

2001, kiam ni unuafoje kuraĝis organizi dutagan landan kunvenon (en la dezerta urbo Arád). De tiam KIES okazis en diversaj turismaj lokoj de Israelo, kiel la Morta Maro (dufoje), Jerusalemo (dufoje), kibuco Ma'agán (apud la Galilea maro) kaj Ĥajfo. Ĉi-foje ĝi okazis fine de oktobro (23–25.10.08) en la druza vilaĝo Bet-Ĝan, kiu situas je alteco de mil metroj, en la koro de la bela natur-rezervejo Meron (supra Galileo). Evidente ĝi estis la plej alta KIES, sed ĝi estis ankaŭ la plej long-daŭra: unuafoje ĝi daŭris tri tagojn.

Samkiel en la antaŭaj semajno-finoj, kunorganizis ĝin Nava Cinori (administrado) kaj Amri Wandel (programo). La 32 partoprenantoj gastis dum du noktoj en ĉarma druza gastejo kaj ĝuis variajn ekskursojn, kulturen kaj socian agadon kaj pliajn interesajn programerojn.

La programo havis kiel ĉeftemon “Folkloro, religioj kaj minoritatoj”. Kadre de tiu temo okazis ekskurso (gvidita de Nava Cinori) al la araba-kristana vilaĝo Ĝiŝ (Guŝ-Ĥaláv) kaj vizito de la ĉerkesa vilaĝo Riĥanija; Amri Wandel prezentis lumbildojn de triboj kaj minoritatoj en la nordo de Tajlando kaj Vjetnamio, gvidis naturan migradon tra kanjona rivero Meron kaj vizitojn de du famaj judaj sanktaj tomboj apud la Kabala urbo Safedo: vendrede, al la fama tombo de rabeno Ŝimon Bar-Joĥáj (RAŜBI), kie oni tradicie unuafoje tondas la harojn de junaj knabetoj en la festo Lag Ba'omer; sabate, al la tombo de Jonatan Ben-Uziel apud Amuka, kiu estas pilgrimejo de piaj gefraŭloj, kiuj esperas trovi edz(in)on. Josef Ŝemer prezentis du distrajn lingvajn kvizojn.

Vendrede, post bongusta tradicia druza vespermanĝo, okazis la ĉefa programo, dum kiu la partoprenantoj konatiĝis kun la druza kulturo (kutimoj, religioj ktp) per folkloraj prezentaĵoj.



KIES-anoj admiras baseneton en kanjono Meron



J. Tilleman donacas al Nazie memorfolion de la E-poŝtmarko

Dum tiaspeca prezentaĵo oni kutime montras tradician druzan fianĉigan ceremonion, sed ĉi-foje okazis spica surprizo: Jarden, la filino de Nava, havis 12-jaran naskiĝtag-datrevenon (*Bat Micva*). La organizantoj kaŝe anstataŭigis la aktorinon, kaj malkaŝante la vizaĝon de la “fianĉino” aperis Jarden, kiu poste estis volvita per Esperanto-flago, kaj oni entuziasme dancis kaj festis ĝis la noktomezo.

Kompare al la pasintjara KIES en Jerusalemo ĉi-foje estis malpli da partoprenantoj kaj aparte mankis eksterlandanoj (pasintjare partoprenis ses gastoj el tri landoj). Fine de KIES okazis la tradicia resuma diskuto. Ĉiuj partoprenantoj estis tre kontentaj de la etoso, la programo, la manĝaĵoj, la gastejo kaj... de la druza gastiganto Nazie, kiu gastame kaj bonhumore organizis ĉion, gvidis, distris kaj eĉ salutis nin en Esperanto.



La ĉefaj konkludoj estis:

- Ripeti la tritagan formaton – sed oni povu partopreni ankaŭ partatempe.
 - Estu elektableco de ekskursoj laŭ temo aŭ malfacileco - ĉiu povu elekti.
 - Same kiel en la du lastaj KIES-oj, estu kadra temo – ĉi-foje ankaŭ la situo kaj la distra programo bele akordiĝis kun la ĉeftemo.
 - Necesas konsideri luadon de aŭtobuso, almenaŭ por la surlokaj ekskursoj.
 - Eksterlandaj partoprenantoj povas multe kontribui al la internacia etoso.
- Pro tio ni devas frue komenci la varbadon de eksterlandaj partoprenantoj.

* Ŝajnas ke kelkajn el tiuj konkludoj la organizantoj jam aplikis, per frua decido pri la venonta semajnfino: la 10-a KIES estas planita por la 22-24-a de oktobro 2009, en la komuna juda-araba vilaĝo *Neve Ŝalom* (kie okazis la seminario antaŭ la UK en Tel Avivo en la jaro 2000). La ĉeftemo “Paco kaj kunekzisto” taŭge akordiĝos kun tiu situo!

** Aldonaj fotoj de la 9-a KIES videblas ĉe <http://picasaweb.google.com/amriwandel/9AKIES>, kie troviĝas ankaŭ la fotoj de la antaŭa KIES en Jerusalemo (<http://.../8aKIES2>).

Bildoj de pli fruaj KIES-oj estas troveblaj plej sube en la retejo <http://amri.pic.co.il>.

Nia vojaĝo en Israelo

Boris Kolker, Usono

EN LA dua duono de marto mia edzino Esther kaj mi faris dusemajnan vojaĝon tra Israelo en turista grupo, kiu konsistis el usonaj aĝuloj. Ĉar tio estis nia dua vizito (en la jaro 2002 mi partoprenis en la 85-a Universala

Kongreso en Tel-Avivo), multajn vidindaĵojn ni jam konis. Sed estis ankaŭ novaj lokoj, kiuj tre impresis nin – la Memorigejo Jad Vašém en Jerusalemo, la Muzeo de la Juda Diasporo (kun granda ekspozicio pri 40-jariĝo de ekbatalo de sovetiaj judoj por elmigro) kaj Ejlato. Revenante al Tel-Avivo el Ejlato per aviadilo, ni vidis sub ni etendiĝantan dezerton kaj denove admiris, kiel israelanoj heroece transformas dezerton en florantan ĝardenon.

De maldekstre: Esther kaj Boris Kolker,
Luiza Carol, Martha Otto, Jehoŝua Tilleman



Dum nia vojaĝo ni havis kortuŝajn renkontiĝojn kun multaj parencoj kaj amikoj, kiujn ni ne vidis dum jardekoj. Kompreneble, ni renkontiĝis ankaŭ kun esperantistoj: en Tel-Avivo kun Josef Ŝemer, Daniel Kolker (kiu ne nur estas mia kuzo, sed ankaŭ estis unu el la plej aktivaj

esperantistoj en Ukrainio, Sovet-Unio kaj poste en Israelo), kaj Matilda Landaŭ. En Ĥajfo kun Jehoŝua Tilleman, Luiza Carol kaj Martha Otto. Kun Jehoŝua mi konatiĝis en 1982 dum la Universala Kongreso en Antverpeno, kiam por la judoj el Sovet-Unio estis danĝere komunikiĝi kun israelanoj. Luiza estas mia prifierinda talenta lernantino; ŝi brile diplomiĝis en mia Internacia Perfektiga Koresponda Kurso kaj jam prespretigis sian unuan libron, verkitan surbaze de ekzercoj el “Vojaĝo en Esperanto-lando”. Kun Martha mi vidiĝas dum Universalaj Kongresoj, sed nur en Ĥajfo troviĝis la okazo, ke mi subskribu al ŝi tiun mian libron.

En Jerusalemo mi renkontiĝis kun la japandevena Tsuguya Sasaki, Mikaelo Giŝpling – unu el la elstaraj nuntempaj Esperantaj poetoj, Adam Raizen kaj Tom Juval. Reveninte hejmen, mi sendis al miaj multaj diverslandaj lernantoj dekon da bildserioj pri Israelo, inkluzive la esperantlingvan pri Tel-Avivo, kiun kreis Amri Wandel. Ni konservas varmajn rememorojn pri nia vojaĝo.

PERSONA RENKONTIĜO: Vivspertoj de infanoj kiuj devenas de Etiopio

Gila Wandel

En tiu ĉi nova rubriko ĉiufoje unu el niaj membroj prezentos sian specialan mondon: profesie, ŝatokupe aŭ alimaniere. Ĉi-foje ni konatiĝas kun Gila, sociala laboristino kiu prizorgas programojn por infanoj en riskaj situacioj kaj iliaj gepatroj, inter ili multaj Etiopidevenaj.

Unua akto: Etiopio

IŜATU naskiĝis en malgranda vilaĝo en Etiopio komence de la somero, kiam oni rikoltas. Tial liaj gepatroj elektis lian nomon, kiu signifas “rikolto”. Li havis kvar gefratojn. La gepatroj de Iŝatu revis pri enmigrado al Israelo, la Sankta Lando, same kiel iliaj najbaroj. La patro de Iŝatu servis iam en la Etiopia armeo. Unu tagon, kiam Iŝatu estis 4-jara, lia patro estis forprenita de soldatoj. De tiam neniu de la familio revidis lin. Oni diris ke eble li estis mortigita. La patrino kun siaj 5 infanoj transloĝiĝis al transit-kampadejo en la granda urbo, sin preparante al migrado al Israelo kun aliaj samfamilianoj de la sama vilaĝo. Ili restis tie dum unu jaro, atendante la translokiĝon. Iŝatu kutimis rondiri tra la kampo, ludante eksterajn ludojn; li kaj liaj amikoj kreis sian “kampeton” sur arbo. Li kaptis fragmentojn de konversacioj pri la atendata migrado al la lando de Israelo. Ne estis klare kiam oni povus moviĝi kaj kiu ricevos permeson.



Dua akto: Israelo

Iŝatu estas 11-a jara. Li nomiĝas nun Josi. Pri tio decidis la oficisto kiam lia familio alvenis Israelon. Simila nomo, diris la oficisto, kaj pli taŭga al Israelo. Jam 4 jarojn Josi loĝas kun siaj patrino kaj gefratoj en povra kvartalo en malgranda urbo en la centro de Israelo. Ili translokiĝis tien de novenmigrada sorbo-centro en la sudo de la lando. Ili loĝas en tri-ĉambra apartamento. Josi dormas en la sama ĉambro kun siaj fratoj. La fratinoj dormas kun la patrino. Tiu, kiu alvenas unua al la lito, gajnas la lokon. La infanoj parolas jam la hebrean; ankaŭ kun panjo. Panjo scipovas nur kelkajn vortojn en la nova lingvo. Neniu parolas pri paĉjo.

Tria akto: En la lernejo

Josi veturas ĉiutage en plenplena buso de infanoj al la lernejo kiu

troviĝas for de lia hejmo. Li havas tie fiksitan lokon, kiun li gajnis per minacoj kaj kun la helpo de liaj amikoj. La junaj infanoj devas respekti la pli aĝajn...

Li estas jam en la sesa klaso.

Li havas librojn kaj kajerojn. Panjo aĉetis laŭ la listo. Li diris al ŝi ke li bezonas ĉiujn librojn, kiel ĉiuj. Li ne rakontis al ŝi ke li ne tre bone komprenas la materialon lernitan en sia klaso. Li vestas la saman ĉemizon jam tri jarojn. Ĝi jam estas iom malgranda kaj kaduka. Ankaŭ liaj ŝuoj estis iam en pli bona stato.

Josi eniras la lernejan korton. Li rigardas ĉirkaŭe esplorante la situacion. Li kaj liaj amikoj planas futbal-ludi dum la posta paŭzo. Alvenante la klason li sidiĝas en sia loko en la unua vico, apud la plej bona lernanto de la klaso. Tio estas plia klopodo de la instruistino helpi lin studi kaj ne malhelpi la aliajn. Josi klopodas kompreni pri kio parolas la instruistino. Tio ne vere interesas lin. Li enuiĝas. Io okazas en la malantaŭaj sidlokoj. Li turniĝas. “Kion vi volas, nigrulo?”, aŭdiĝas demando. Josi stariĝas, alproksimiĝante al la parolinta knabo: “Kion vi diris?”. “Ĉu vi estas ankaŭ surda?”, respondas la alia knabo. Josi saltas je li, faligante lin sur la plankon, kriante: “Vi ne blasfemu min, bat-kremulo*!” Pli li jam ne memoras. Li vekiĝas en la konata sed malagrabla ĉambro de la direktorino. “Fek’, denove oni vokos panjon kaj faros el tio grandan aferon. Nu, bone, posttagmeze mi rekompencu min: mi ‘pruntos’ de Moŝe lian biciklon por rondveturo. Kial nur li ĝuu?!”

Fono: la enmigrado el Etiopio

Iŝatu-Josi estas unu el kelkdek miloj da novenmigrintaj judoj de urboj, kaj plejparte de vilaĝoj en Etiopio. La enmigrada procedo estis kaj daŭre estas komplika. La judoj en Etiopio estis komunumo izolita de la cetera juda popolo dum centoj da jaroj. Eĉ kiam la mondo ekkonsciis pri ili, kaj ili mem ekkonsciis pri la ebleco realigi la religian revon atingi Jerusalemon, la realeco starigis multajn malfacilaĵojn. La procedo en Etiopio estis malfacila kaj eĉ danĝera, speciale en la okdekaj jaroj. Multaj fuĝis de siaj vilaĝoj al Sudano, perdante familianojn pro malsanoj kaj registaraj atakoj. En la naŭdekaj jaroj la pli bonŝancaj el ili atingis kampadejon por rifuĝintoj apud la ĉefurbo Adis-Abebo. Ankaŭ tie la vivo estis malfacila, loĝante en transitkampadejo

* hebree: “ŝaménet” (batkremo), insulta voko uzata de Etiopidevenaj junuloj por blankuloj.

dum multaj monatoj.

En Israelo, for de la danĝeroj de sia origina lando, la novenmigrintoj alfrontas novajn malfacilaĵojn: tiujn de la adaptiĝa procezo. Ili devas adaptiĝi al la tre diversa vivstilo en la nova lando, luktante kun la malfacilaj memoroj kaj perdoj de parencoj, kun malsanoj, kun fremdaj lingvo kaj kulturo. Multaj gepatroj havas malfacilaĵojn adaptiĝi al eduksistemo diferenca de tiu konata al ili. Multaj profesiuloj pri edukado kaj aliaj servo-profesioj havas malfacilaĵojn kompreni la kutimojn de la nova komunumo kaj adaptiĝi al ili. La infanoj kaptiĝas en la mezo, klopodante alpreni la israelajn kutimojn, foje sen kompreni ilian signifon, forlasante la tradiciajn etiopiajn kutimojn. Multe da laboro estas investita de profesiuloj kun reprezentantoj de la komunumo por ebligi al tiu ĉi speciala komunumo konservi ĝian tradicion kaj memestimon kaj samtempe sukcese luktadi kun la vivdandoj kaj kutimoj en Israelo.

“Tri” Natan Zaĥ

Elhebregis: Ŝaul Ŝemer

Tri miopulinoj Surmetas okulvitrojn kaj kontaktolenojn

Sin gardas nokte, lavas Per speciala likvaĵo la vidaĵojn,

Kiujn ili vidis dum la tago,

Unufojon jare ŝanĝas okulvitrojn,

La lensoj maldikiĝas pli kaj pli,

Ne junaj, ankoraŭ ne gravediĝis,

Maljuniĝas kiel sur piedaj dikfingroj,

Ankoraŭ ne naskis,

Sin gardas legante en la lito,

Rememoras kuŝante pri amo

Kiu ne estis ilia,

Per iliaj okuloj, malsanaj okuloj

Ili vidas de proksime Malbonan mondon pli kaj pli malproksimiĝantan.

Foje, kiam ili ĝojas pro vino,

Per subita kaj nebuleca malico,

Kiu preskaŭ proksimas je doloro,

Ili ŝercas: “Mi preskaŭ ne vidas vin, Proksimiĝu, vi preskaŭ ne ekzistas.”



Jeremi Gishron (1948–2008)

La 18-an de februaro forpasis en Jerusalemo pro koratako Jeremi Gishron, nur 59-jara. Li estis multjara membro de UEA, Vicdelegito de Jerusalemo kaj Fakdelegito pri Hilelismo, historio de Jerusalemo kaj judismo.

Li postlasis edzinon kaj 3 gefilojn.

Jeremi Gishron naskiĝis en Svedio kiel kristano Hans Henrikson kaj tie esperantistiĝis. Li multe interesiĝis pri teologio kaj decidis judiĝi. En 1981 li enmigris Israelon kaj ekloĝis en Jerusalemo.

Tiujare aperis lia svedlingva doktoriĝa disertacio pri “Hilelismo, la pontoreligio de Zamenhof”. Li verkis dekojn da broŝuroj en Esperanto, sveda, hebrea kaj angla lingvoj, precipe pri religiaj kaj filozofiaj temoj, kaj ankaŭ kelkajn librojn. Unu el ili estis *Lingvo kaj religio* (1986, 212 paĝoj). En la katalogo de UEA aperas 8 titoloj de liaj verkoj. Jeremi havis multajn ŝatatajn temojn, inkluzive de verkado de kantoj en Esperanto, kantado kaj muzikludado, geografio (lia tiama profesio), teologio,



hilelismo, homaranismo, dezajnado de emblemoj, kreado de lingvaj reformoj ktp. En Jerusalemo li fondis *Centron*

Sivron, kiu estis eta Esperanta instituto servanta ĉefe por eldoni bulteneton kaj aliajn eldonaĵojn. La bulteneto nomiĝis JEBULO (“Jerusalema Bulteno en E-o”),

aperis neregule sed estis dissendata ankaŭ al esperantistoj en eksterlando. En ĝi kaj en la nemalmultaj broŝuroj de li eldonitaj, Jeremi proponis diversajn lingvajn reformojn, prezentis opiniojn (foje nekutimajn) pri multaj sociaj kaj ideologiaj temoj kaj ofte rilatis al la ideoj de d-ro Zamenhof. Li aktivis en la esperantaj movadetoj por Hilelismo kaj Homaranismo, kaj havis multajn korespondantojn el eksterlando kun kiuj li dividis siajn ideojn. Unu ekzemplo por kurioza ideo de Jeremi: li hebreigis la nomon de la Internacia Lingvo al SIVRONIT, pro tio ke *sivron* signifas “espero” en la hebrea lingvo.

En Jerusalemo dum kelkaj jaroj li estis la “neoficiala” gvidanto de la loka grupo kunordigante ĝiajn renkontiĝojn. Li partoprenis kelkajn Univer-

salajn Kongresojn de Esperanto. Kelkfoje li kantis kaj ludis muzikilojn en la tel-aviva klubo kaj dum niaj Landaj Kunvenoj.

Estu lia memoro benata!

Mordeĥaj Braĥa (1925–2008)



Mordeĥaj Braĥa el Tel-Avivo forpasis la 15-an de februaro post kelksema jna malsano, en la

aĝo 84. Li estis unu el la plej fidelaj membroj de la tel-aviva Esperanto-klubo, inter la plej amataj israelaj samideanoj kaj unu el la plej ŝatataj reprezentantoj de Israelo en la Universalaj Kongresoj de UEA.

Mordeĥaj lernis Esperanton ĉ. 1975, jam en Israelo. Li naskiĝis en Istanbulo (Turkio) en 1925. Hejme oni parolis judhispane, do li regis bonege tiun ĉi lingvon kaj la turkan. Li servis en la turka armeo kaj kelkfoje rakontis al ni, ke kiel judo li ne rajtis teni fusilon. Lia familio enmigris Israelon en 1949. La saman jaron li soldatiĝis kaj militservis plejparte kiel ŝoforo. La hebrean lingvon li lernis nur dum la arma servo. Poste li faris diversajn laborojn, precipe korpajn:

ŝoforo, masonisto, ĝardenisto ktp. Li estis ĉiam tre diligenta laboristo. Dum la lastaj jaroj antaŭ sia emeritiĝo li kiel ĝardenisto flegis kun granda amo publikajn ĝardenojn en sia loĝ-kvartalo Hadár-Joséf, Tel-Avivo.

Mordeĥaj estis edziĝinta dum mallonga tempo. Poste dum kelkaj jaroj li vivis kaj laboris en Peruo apud familianoj, sed decidis poste reveni al Israelo poreterne. Li ĉiam vivis tre modeste, laŭ kelkaj el ni eĉ tro...

Li multege legadis librojn, en kelkaj lingvoj, sed precipe en Esperanto. Ĝis lia esperantistiĝo, liaj ŝatokupoj estis tenisludado, biciklado, popoldancado kaj long-marŝado. Sed ĉirkaŭ 1975 aldoniĝis nova amo: Esperanto. Tiam, en la aĝo 50, li aliĝis al la kurso de d-ro Maŝler kaj ekde tiam Esperanto estis lia plej granda amo. En certa aĝo li ne plu kapablis bicikli, marŝadi kaj danci, sed esperantumi li ja povis fidele ĝis liaj lastaj tagoj. Li vere amegis la internacian lingvon kaj la samideanojn. Kiel jam menciite, li legadis preskaŭ nur en Esperanto. Li estis la plej fidela kliento de la biblioteko de ELI. Li venadis regule al la ĉiusemajnaj kunvenoj de la klubo en Tel-Avivo, en ĉiu ajn vetero, ĝis la lastaj monatoj de sia vivo.

La klubo estis tre grava por li kaj

li ofte esprimis sian malkontenton pro la malgranda nombro de la ĉeestantoj kiu estis dum certaj epokoj. Ĉiu novlerninto ricevis de li, vole nevole, konsilojn pri “la plej bona maniero por perfektigi vian lingvoscion kaj uzi Esperanton”.

Mordeĥaj “vivis de Kongreso al Kongreso”: ekde 1976 li partoprenis multajn kongresojn de UEA kaj tiamaniere vizitis la tutan mondon: Kubo, Ĉinio, Eŭropo ktp. Li akiris tie multajn geamikojn kaj fariĝis tre konata kaj populara inter la regule vizitantaj kongresanoj, ĉefe pro liaj ekster-ordinaraj afableco, bonkoreco, helpemo kaj amikeco.

Li korespondis kun multaj eksterlandaj Esperantistoj, amis ilin, kaj al mi ŝajnis ofte ke li floras dank’ al Esperanto. Li rakontis al mi, ke li dum la tuta jaro ŝparas monon por povi veturi al la kongreso. Kiel jun-animulo li partoprenis ankaŭ kelkajn Junularajn Kongresojn. Al la “tuta mondo” en Israelo li rakontis pri Esperanto kaj stimulis ĉiun ajn



lerni ĝin.

Dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj li estis regule invitata al la ĉiumonataj renkontiĝoj de niaj gejunuloj (JELI). Malgraŭ lia neĵuna aĝo ni volonte invitadis lin kaj li sentis sin tie kiel unu el ni. Kelkfoje li eĉ gastigis la junajn membrojn en sia hejma ĝardeno.

Mordeĥaj estis vere modelo de homo, pri kiu ne eblas diri eĉ unu malbonan vorton. Lia amis ĉiujn kaj ĉiuj amis lin. Li amis la vivon kaj profitis de ĉiuj ĝiaj bonaj flankoj. Li estis malriĉa materie, sed riĉa spirite: Esperanto, la libro-legado kaj la

kongresoj donis al li multe da feliĉo kaj mia-opinie ebligis al li flori.

En marto okazis en la tel-aviva klubo vespero plene

dediĉita al Mordeĥaj. Li meritas nian admiron kaj amon kaj li certe restos kar-memora poreterne ĉe la koroj de ĉiuj israelaj Esperantistoj.

ELI kondolencas Sergeant Tyrin, vicredaktoron de IE, pro la subita forpaso de lia patro.

La-ternato -A.Wandel

*Kiam oni demandas
"kiel varbi por Esperanto"?
Mi respondas verse:*

*Certe konas vi, leganto
Faman ŝercon,
Rimo, kanto
Esperanto - edzperanto*

*Sed dependas de la aĝo
Karaktero de l'varbajho
Kaj por lingvo Esperanto
Tre varias la-ternato:*

*Por la beboj - such-ternato
Por infanoj - songh-ternato
Por geknaboj - sent-ternato
Junulinoj - svat-ternato*

*Por modernaj junulinoj,
viroj chiaj, virgulinoj
Ja konatas la inklinoj:
Esperanto - seks-ternato
Por geamantoj - kor-ternato
Por fraulinoj - edz-ternato
Patrinemaj solaj inoj -
Sem-ternato, punkto fino*

*Laste por la malsanuloj
hipokondrianoj, maljunuloj:
la plej bona kuracanto -
Esperanto - san-ternato*

*Per Esperanto eblas chio
Sed depende de l'metio:
Parlamentano - legh-ternato
Chefministro - segh-ternato*

*Estas pastro - sankt-ternato
Muzikisto - son-ternato
Magiisto - sorch-ternato
La sportisto - torch-ternato*

*Sciencisto - sci-ternato
Komputisto - mus-ternato
Por verkisto - muz-ternato
La aktor' - amuz-ternato*

*Advokato - legh-ternato
Jhurnalisto - leg-ternato
La richulo - sum-ternato
Malrichulo - shpar-ternato*

*Tiel aghe kaj metie
Disvastighos pli kaj plie
Sendepende del-ternato
Varbos ni por Esperanto.*



Partoprenantoj de la 1-a Mezorianta Esperanto-Kunveno en Amano